



中國報道


EL POPOLA

# ĈINIO



- Provoj de kampara reformo
- Nova amikeco kun familianoj de Zamenhof
- Normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio — nepra tendenco





## INTER NI

● Mi deziras trovi pli da detaloj pri la vivo de ĉinaj virinoj. Mi deziras esti certa, ke la esperantaj gazetoj entenu nur la veron kaj ke neniam oni uzu ilin kiel propagandilon.

E. SIMONE (Francio)

*(De 1989 en la rubriko "Intervjuoj" ni publikigos artikolojn pri la vivo de ĉinaj virinoj. — La Red.)*

● Kial EPC praktikas indiferentan starpunkton? EPC en 1984 skribis "komputilo" kaj en 1985 ni trovis "komputero" por la sama aparato.

PIV instruas: komputero. Behr diras, ke laŭ PIV komputilo nur nombras kaj montras rezulton de tiu nombrada.

A. KOLARIĆ (Jugoslavio)

*(Iam en la pasinteco ni samtempe uzis vortojn komputilo kaj komputero, tio kaŭzis konfuzon. Kaj nun ni uzas nur la vorton komputilo. — La Red.)*

● Malgraŭ ke la rubriko estas interesa, mi pensus ke kelkaj mallongaj priskriboj pri la fotoj estus utilaj. Tamen, mi preferis la antaŭan rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj".

P. CERRETINI (Italio)

*(Iam ni nuligis la rubrikon pro manko de koncernaj fotoj. Ni deziras pli da fotoj de niaj samideanoj en la nova jaro. — La Red.)*

● Tre nervozigas min, ke mapo de "Menciitaj lokoj" en ĉiu numero estas sur alia paĝo. Ĉu ĝi ne povus esti ĉiam sur la sama paĝo?

K. GARNCARZ (Pollando)

*(De la unua numero de 1989 ni aperigas ĝin ĉiam sur la 5-a paĝo. — La Red.)*

La aŭreolo de Huangshan-monto  
Foto de SUN YONGXUE



# ENHAVO

- 15 **Provoj de kampara reformo**
- 18 Vojaĝo laŭ la malnova fluejo de la Flava Rivero
- 54 VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (27): Vido de la urboj Wuhu kaj Maanshan
- 13 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ: **Nova amikeco kun familianoj de Zamenhof**
- 28 SUR NIA LIBROBRETO: Ĉu eŭtanazio estas pravigebla?
- 30 POR KOMENCANTOJ: La aŭtobiografio
- 48 ESP-NOVAĴOJ
- 6 FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO: **Lando de bicikloj**
- 33 Sekuriga protekto de ĉinaj civilaj nukleaj ekipaĵoj
- 25 Ĉina oceanografia stacio sur Nansha-insularo
- 49 Familia problemo de psikologia docento (Novelo)
- 51 ĈINA LITERATURO:  
Ci-istino Li Qingzhao  
Elektitaj verkoj de Li Qingzhao
- 22 Martaj kantoj de ĝuangoj
- 59 ĈINAJ ARTOJ: La pejzaĝa pikturo de Ĉinio (II)
- 31 Akupunktura anestezo en Irano
- 32 ĈINA MEDICINO: Sendrogaj terapioj de la ĉina medicino (III)

- 11 **Problemo pri migrantoj**
- 37 Infanĝardeno plene konfidinda
- 40 Elafuroj revenintaj al la hejmloko
- 41 Papilioj
- 44 ALILANDANOJ PRI ĈINIO: Ĉinio en okuloj de germano
- 29 **Normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio — nepra tendenco**
- 35 KURANTAJ AFEROJ
- 4 INTER NI

## SUR LA KOVRILO:

Saluton! Foto de **CAI SHUNCHENG**  
La Turo de Flava Gruo  
Foto de **HUANG KEQIN**

La Turo de Flava Gruo ricevis la nomon pro tio, ke ĝi situas sur la rokego Flava Gruo de la Serpenta Monto en la distrikto Wuchang, Hubei-provinco. La turo ekaperis en la jaro 222 kaj spertis plurfojan ruiniĝon kaj rekonstruon. La lasta restituo estis plenumita en 1985. La turo altas 51.4 metrojn kaj okupas 1 000 kvadratajn metrojn.

## La aŭreolo de Huangshan-monto


Foto de **SUN YONGXUE**  
Sur dezerto (Ĝenroj de nacimalplimulto)  
de **LIU DAWEI**

## SUR LA DORSKOVRILO:

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ  
Primitivaj arbaroj de Sovetunio en aŭtuno kaj vintro  
de **ALEKSANDR KOVALJOV** (Sovetunio)

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Henan-provinco
- 2. Lankao-gubernio
- 3. Anhui-provinco
- 4. Dangshan-gubernio
- 5. Jiangsu-provinco
- 6. Xuzhou
- 7. Shandong-provinco
- 8. Ĝuangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono
- 9. Nansha-insularo
- 10. Weifang



FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

# Lando de bicikloj

Teksto de CHEN BAOHE

Fotoj de HAI FENG kaj WANG WENLAN



Ĉe la brilo de haltlampo Foto de CHENG WEIDONG

**O**NI nomas Ĉinion lando de bicikloj. Tio ja ne estas troigo — Ĉinio nun havas pli ol 200 milionojn da bicikloj.

En Ĉinio ĉu somere ĉu vintre, ĉu en urbegoj kun milionoj da loĝantoj ĉu en vilaĝoj, kie ne vidiĝas eĉ asfaltita vojo, ĉiam kaj ĉie vidiĝas bicikloj.


Ĉinio ja estas lando disvolviganta. Ĝia publika trafiko estas subevoluinta. Inter la miliardo da ĉinoj nur tre malgranda nombro da familioj havas privatan aŭton, sekve de tio la malmultekosta, tre utila kaj facile manipulata biciklo funkcias kiel populara

veturilo de la ĉinoj (En Ĉinio ĉiu biciklo kostas 50-70 usonajn dolarojn).

En kulminaj horoj, sur la stratoj de ĉiuj urboj, precipe de la grandaj urboj, vidiĝas spektakla torento da bicikloj.

El la ĉinaj urboj Pekino havas plej multajn biciklojn. Nun en Pekino iradas 6.11 milionoj da bicikloj. Por faciligi la bicikladon oni faris 8-10-metre larĝajn biciklajn koridorojn ambaŭflanke de la ĉefaj stratoj.

La urbanoj ŝatas bicikladon, ĉar biciklo havas pli



Bicikloj kun birdkaĝoj

Ĝuado de strata spektaklo sur triciklo





Reveno de kampo

multe da avantaĝoj ol aŭtobuso. En Pekino ĝenerale oni devas 1-2-foje ŝanĝi aŭtobuson aŭ trolebuson por iri de la hejmo al la laborloko. Eĉ se oni frue forlasas sian hejmon, ili ne povas garantii ĝustatempan alvenon al la laboro, ĉar voj-ŝtopo kaj bus-atendo estas temporaba. Biciklado estas ne nur tempoŝpara, sed ankaŭ oportuna en mallarĝaj stratoj sen busoj, tial ĝenerale oni povas atingi la celokon akurate.

Estas ja malfacile por la junaj gepatroj porti sian infanon al la infanĝardeno, kiu troviĝas malproksime. Ĉu per aŭtobuso? Estas tre malmulte da gepatroj, kiuj volas sin ĵeti en batalon por enbusiĝi kun sia infano, tial ili nature preferas biciklon.

Ili do fiksis bambuan aŭ plastan seĝeton sur la transversa tubo aŭ pakaĵ-portilo de la biciklo. La seĝeto estas farita de fabrikoj aŭ metiistoj speciale por infanoj, kaj facile aĉetebla en vendejoj. Kun tia seĝeto oni povas veturi kune kun sia infano. La trafika regularo de ĉinaj urboj malpermesas porti sur bicikloj homojn, inkl. de infano. Ĝi celas malpliigi akcidenton. Tamen junaj gepatroj ne volas forlasi la supre diritan aranĝon, ili puŝas sian biciklon nur tie, kie staras policisto, kaj en malfavora loko. Iuj muntis plian radon kaj ŝanĝis biciklon en triciklon kun tegmentita ĉareto, kies veturon la policistoj ne malpermesas.

Biciklo estas ne nur veturilo, sed ankaŭ nemanĝebla transportilo. Urbanoj ofte biciklas al vendejo kaj metas la aĉetitajn ĉiutagajn bezonaĵojn sur la pakaĵ-portilon de biciklo. Nun multaj muntis metalan aŭ plastan korbon en la antaŭa parto de biciklo por teni legomojn aŭ aliajn objektojn.

En Ĉinio 60% de la 200 milionoj da bicikloj apartenas al kamparanoj. La kamparanoj ne ŝatas leĝeran biciklon, al ili plaĉas ŝarĝ-biciklo. La biciklo fortikigita per pliaj ŝtaltuboj en la antaŭa kaj posta partoj povas veturi eĉ sur malglata vojo, portante objektojn 100-kilogramajn. En norda Ĉinio kamparanoj eĉ mem faris biciklon el fortikaj ŝtaltuboj por transporti pli da varoj. Kamparanoj proksime de Pekino ofte transportas per tiaj bicikloj legomojn kaj fruktojn al la urbo por vendi.

Ankaŭ trena ĉareto kun du radoj post biciklo estas fiera kreo de kamparanoj por grandigi funkcion de biciklo. Kvankam la metodo multe malpliigas la rapidecon de veturado, tamen ĝi multe ŝparas transportan koston por kamparanoj, kiuj volas transporti ŝrankon, liton, sofion kaj aliajn grandajn meblojn al urba foiro.

Triciklo, vario de biciklo, estas ordinara veturilo en Ĉinio. Triciklo estas duspeca: vara kaj pasaĝera.



La vara triciklo havas en la posta parto oblongan lignan platformon destinitan por meti varojn. La pasaĝera triciklo havas dusidan seĝon. Nun iuj triciklistoj atendas antaŭ fervoja stacio kaj vendejo por trovi pasaĝerojn. Antaŭ nelonge en Pekino kaj aliaj urboj aperis malgranda triciklo, fabrikita speciale por gemaljunuloj. Tia triciklo estas malalta kaj havas keston en la posta parto. Ĝia rado havas diametron de 20 coloj, sekve ĝia veturo estas sekura. Tiaj tricikloj tre plaĉas al gemaljunuloj en Pekino. Ili triciklas aŭ al vendejo aŭ al sia amiko. Triciklo plaĉas ankaŭ al iuj junuloj kaj mezaĝuloj. Iafoje vidiĝas surstrate: junulo triciklas antaŭe, dum la edzino kaj infano (foje ankaŭ maljunulo) sidas sur la kesto.

La populariĝo kaj uzvaloro de bicikloj vekis vastan intereson ĉe alilandaj studentoj studantaj en Ĉinio kaj alilandaj turistoj. Nun en la Pekina Lingva Instituto studas 1 000 alilandaj studentoj. Triono el ili nun prenas biciklon kiel sian veturilon. Iuj alilandaj turistoj humure diris, ke vojaĝante en Pekino oni devas grimpi la Grandan Muron, manĝi rostitan pekinan anason kaj bicikli surstrate.

Por kontentigi la bezonon de ĉinoj kaj alilandanoj, oni luigas biciklojn en multaj ĉinaj urboj kaj turismaj lokoj. Se oni ne volas aŭton, oni povas lui



Por vidi pli klare

Al foiro



biciklon. Nur se oni atentis afiŝtabulojn, oni facile trovas biciklo-luejon. La luprezo estas racia: la lua kosto de unu biciklo por unu tago ĝenerale ne superas unu usonan dolaron.

La 200 milionoj da bicikloj sendube multe helpas ĉinojn en ilia vivo kaj laboro, sed la grandkvanta apero kaj kontinua pliiĝo de bicikloj (ĉiujare la nombro de bicikloj en Ĉinio pliiĝas je 10-15%) prezentas al la ĉinoj malfacile solveblajn problemojn. Ili donas oportunon al la biciklantoj en trafiko, kaj samtempe obstrukcas urban trafikon. Statistiko montras, ke pli ol duono de la 200 milionoj da bicikloj ĉiutage partoprenas la biciklan torenton surstrate. En la urboj 70% de la stratoj estas konstruitaj fakte por la bicikloj. Sekve de tio oftigas akcidentoj. En 1987 okazis 1630 trafikaj akcidentoj pro bicikloj, en kiuj mortis 169 homoj. En alia granda urbo Tianjin 40% de la trafikaj akcidentoj koncernas biciklojn. Tio jam fariĝis kaprompa problemo por la ŝoforoj kaj policistoj. Krome, ankaŭ la problemo pri garaĝo de bicikloj fariĝas ĉiam pli serioza kaj ankaŭ ne bone solviĝis ĝis hodiaŭ. Eble nun venas la tempo, ke la ĉinoj devas serioze pripensi, ĉu iliaj bicikloj ne estas tro multaj. ■



Li kuretas kun biciklo.

#### Biciklantoj antaŭ elementa lernejo





CHEN BAOHU

# Problemo pri migrantoj

Homa torento sur strato de Pekino

**L** OGANTOJ de grandaj urboj, kiaj Ŝanhajo, Pekino kaj Kantono, estas plendantaj kontraŭ la pli kaj pli kreskanta enmigrantaro.

Tiuj migrantoj venas kun diversaj celoj: iuj por viziti amikojn aŭ parencojn, aliaj por kuraco, triaj por kunveno aŭ studo kaj la ceteraj por aĉetado aŭ ofertado... Grandan parton de tiu armeo konsistigas kamparanoj. Ili, superflujaj laborfortoj en la nuna ĉina kamparo, venas al la grandaj urboj por serĉi laboron.

## MALFERMIĜO DE LA URBOJ

Abrupta kresko de la migrantaro en la grandaj urboj okazis en la lastaj jaroj. En la 80-aj jaroj Ĉinio akcelis sian ekonomian reformadon, kio rezultigis rapidan disvolviĝon de varekonomio. Pro la vigliĝo de la ekonomio, intervizitoj kaj migrado de homoj fariĝis

nebremseblaj. La urboj fine malfermis sian "pordon" antaŭ la verekonomia torento. Kvankam ĝis nun la ĉina registaro neniam mal-

streĉis la rigoran limigon de kresko de urbanaro, kaj estas malfacilege akiri la rajton fiksloĝi en urbo, tamen la restado en urboj fakte jam

Atendantoj de aŭtobuso





Kampanaroj liveras al urbanoj abundajn agrikulturaĵojn.

Antaŭ biletoŝanĝejo de la Pekina Fervoja Stacio



ne estas limigita, nur se oni laŭleĝe perlaboras. Statistiko en 1988 raportas, ke en Pekino estas 1.1 milionoj da migrantoj, en Ŝanhajo — 1.5 milionoj, kaj en Kantono — unu miliono. Tian fenomenon oni rimarkas ankaŭ en aliaj grandaj kaj mezgrandaj urboj. La problemo pri migrantoj fine vekis atenton kaj zorgon de la tuta socio.

## GRANDA PROBLEMO

La plej ĉagrena ĝeno, kiun la migrantaro alportis al la grandaj urboj, estas la plia malfaciliĝo de trafikado.

La publika trafiko en grandaj urboj de Ĉinio neniam estis sufiĉe disvolvita. Kvankam en la lastaj jaroj oni plimultigis trafikilojn kaj larĝigis la vojojn, sed tio ne povis radikale solvi la problemon precipe de la grandaj urboj, kiaj Pekino kun 10 milionoj da loĝantoj kaj Ŝanhajo kun 12 milionoj da loĝantoj. Do la kreskanta migrantaro pli malfaciligis la trafikadon.

En aŭtobusoj ofte eksplodas kverelo inter urbanoj kaj alilokanoj. La urbanoj plendas, ke la entorentantaj alilokanoj kun amaso da pakajoj okupas grandan spacon en la aŭtobuso. Ankaŭ la ŝoforoj kaj konduktoj malagrabiĝas, ke ilia laboro estas plipezigitaj. La aŭtobusoj kaj la haltejoj de la trunkaj linioj en Pekino ĉiam estas super-

plenaj de homoj, ĉu en kulminaj horoj aŭ ne. En la plej plenplenaj aŭtobusoj ĉiu kvadrata metro devas enteni 13 veturantojn.

Loĝantoj de grandaj urboj sentis pezegan premon de la alilokanoj ankaŭ en la homplenaj magazenoj.

En ĉefaj komercaj kvartaloj de Pekino kaj Ŝanhajo, se nur la magazenoj kaj butikoj estas servantaj, ĉu en la magazenoj ĉu sur la stratoj, ĉiam svarmas homa torento, kaj duono aŭ eĉ pli granda parto de tiu homa torento estas alilokanoj. Pro tio multaj urbanoj pli kaj pli tediĝis de vizito al grandaj magazenoj, precipe en dimanĉo. Aŭ se ili iras al vendejoj, ili revenas ofte malkontentaj, ĉar antaŭ ĉiu vendotablo interpuŝiĝadas svarmo da homoj aŭ serpentumas longa vico de aĉetantoj.

La premo alportita de la drasta kresko de migrantaro pruviĝas en komunikado, urba troloĝateco, provizo de greno, akvo, elektro kaj gaso, kaj ankaŭ en publika higieno. Al la multiĝo de krimoj rekte rilatas la entorento de alilokanoj. Estas raporto, ke en 1987 kaj 1988, alilokanoj konsistigas duonon de la krimintoj en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. En Kantono, 70 procentoj de la gravaj krimoj estis faritaj de alilokanoj.

## GAJNO KAJ PERDO

Kvankam la migrantoj alportis al la urbanoj ĝenon kaj maltrankvilon, sed tamen ili alportas ankaŭ oportunecon. Tion plej elokvente pruvis la pli kaj pli viglaj bazaroj. Tiuj bazaroj pli kaj pli vigliĝis dank' al la senĉese kreskanta nombro da enmigrantaj kamparanoj. La bazaroj vendas ĉefe legomojn, viandojn, kortobirdojn, ovojn, fiŝojn kaj aliajn agrikulturajn produktaĵojn. Cetere la bazaroj vendas ĉiutagajn bezonaĵojn kaj vestojn, kaj ankaŭ liveras servon de riparado. La urbanoj povas aĉeti bezonaĵojn proksime de sia hejmo.

Ofertistoj kaj aĉetistoj de alilokaj entreprenoj, kaj la homoj okupigantaj pri komercado kaj transportado multe stimulis la ekonomian vivon de la urboj. La ĉiutaga konsumado de la miliono da migrantoj ebligis al la komerca, hotela kaj alispecaj servoj gajni gigantan enspezon. Statistiko el Pekino kaj Ŝanhajo raportas, ke ĉiutage la migrantoj "pagas" al la urboj 10 milionojn da juanoj. Direktoro de la magazeno Dong-an de Pekino diris al mi, ke lia magazeno ĉiutage vendas varojn de pli ol 100 milionoj da juanoj, kaj alilokanoj konsistigas plejparton de la klientaro.

Alilokanoj rekte kontribuas al

plibeligo de la aspekto de la grandaj urboj. En Pekino, Kantono kaj aliaj grandaj urboj leviĝis unu post alia belaj hoteloj, loĝdomoj kaj aliaj konstruaĵoj en la lastaj jaroj. Plejparto de la konstruintoj de tiuj domoj estis kamparanoj. La profesio de konstruisto neniam estas ŝatata de urbaj junuloj kaj multaj el ili preferas sidi hejme kiel senlaboruloj ol labori kiel konstruistoj. En tia situacio, la kamparanoj plenumis la bezonon de urba konstruado.

En la urboj, krom konstruado, ankaŭ la purigado, kemia industrio, ŝarĝado, restoracio kaj aliaj branĉoj bezonas kamparanojn por ŝtopi la mankon de laboruloj. Laŭ statistiko, en Kantono estas 250 000 konstruistoj venintaj el la kamparo. En Pekino laboras pli ol 50 000 hejmservistinoj venintaj el la kamparo de la provincoj Anhui, Hebei kaj Shandong. En Chengdu, la ĉefurbo de la provinco Sichuan, pli ol 60 000 alilokanoj laboras kiel hejmaj servistinoj kaj riparistoj.

## KOMPLIKA MALFACILO

Ekzistas du kontraŭaj opinioj pri la grandnombra migrantaro. La unua proponas rigore limigi la nombron de migrantoj kaj mallongigi ilian restadon en la urboj, por liberigi la urbojn el sub la premo. La dua male opinias, ke migrado al grandaj urboj estas neevitebla en la ekonomia reformado, malgraŭ ke ĝi faras premon al la urboj. Duonfermi urbopordojn obstrukcos la progreson de la ekonomio. Por moderigi la premon, oni devas perfektigi superregon, rigorigi licencon al komercado kaj restado. Krome oni devas dece imposti komercadon de alilokanoj, por subvencii per tiu monsumo la urbokonstruadon. Portempe la dua opinio estas aprobita de pli multaj homoj. Sed tamen estas malfacile fari fiksan superregon pri la centoj da miloj da homoj, kiuj venas kaj foriras senregule, kaj ne havas fiksan loĝejon nek fiksan servan lokon. Kaj tio montriĝas pli malfacila dum la transiro de la malnova ekonomia sistemo al la nova. ■

## LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ

# NOVA AMIKECO KUN FAMILIANOJ DE ZAMENHOF

de CHUN-CHAN YEH

**J**ULIE de 1987, dum la 72-a UK en Varsovio mi renkontis mian malnovan amikinson Inga-Maya kaj pere de ŝi konatiĝis kun Ludwik Zamenhof, nepo de nia majstro. Jam en la 40-aj jaroj mi konatiĝis kun lia patrino Wanda Zamenhof.

Julie de 1949 mi partoprenis la 34-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi estis la plej grand-skala post la Dua Mondmilito. Dum la mondmilito Esperanto kaj esperantistoj estis kruele turmentitaj kaj sekve la kongreso ne okazis en 8 jaroj. La 34-a UK markis la releviĝon de la Esp-movado kaj portis apartan signifon. La familianoj de L. L. Zamenhof, kiel judoj kaj posteuloj de la kreinto de nia lingvo, plejparte mortis en koncentrejoj de nazioj. Vivis nur Wanda, bofilino de nia majstro, kaj ŝia filo Ludwik Zamenhof. Ŝi estis invitita partopreni en la 34-a UK.

Ĉe la inaŭguro de la kongreso mi trovis, ke Wanda Zamenhof si-

das sur la podio. Inter mi kaj ŝi sidis sveda samideano Adamson. Li konigis min al ŝi.

Tiam ŝi, ĉirkaŭ-50-jara, estis grizhara, silentema kaj iom malserena, kion eble kaŭzis la longtempa maltrankvilo pri persekutado kaj turmentado far nazioj. Tamen ŝi montris al mi apartan fervoron. Ŝi antaŭe neniam kontaktis ĉinajn esperantistojn. Por ŝi estis novaĵo, ke Esperanto populariĝis en Ĉinio, kie entuziasme subtenis ĝin Hujucz, Lusin, Bakin kaj aliaj influhavaj eminentuloj aŭ verkistoj. Ŝi diris, ke ŝia bopatro certe ĝojus kaj fierus, se li sciis, ke la lingvo populariĝas en antikva civilizita lando, kia Ĉinio. "Ne, ĝojas nia tuta familio..." subite ŝi ĉesis paroli kun malserena mieno.

Ŝi konigis al mi la travivaĵon de la familio Zamenhof. D-ro L. L. Zamenhof havis 3 infanojn — Sofia, Adam kaj Lidia. Lidia bonkora kaj milda, estis eminenta esperantistino. Ŝi kaj ŝia fratino estis kune



Ludwik Zamenhof (dekstre), Inga-Maya (meze) kaj Chun-Chan Yeh en Varsovio

ĵetitaj en koncertojn. Adam, la edzo de Wanda, mortis pro torturado en juda izolejo. Eskapis nur ŝi kaj ŝia filo, kiuj postvivis savite de esperantistoj.

S-ro Adamso kaj liaj edzino kaj solfilino Inga-Maya partoprenis la kongreson, en kiu ili renkontis Wanda kaj min. Pro tio ili ekstreme ĝojis. Inga-Maya estis gaja virino. Kun ŝi ni iom post iom forgesis la ombbron de la milito postlasitan en nia memoro kaj pro tio Wanda ne plu estis malĝoja, parolante pri la malfeliĉo de sia familio.

Pro diversaj kaŭzoj mi ĉesis kontakti kun ŝi por 30 jaroj. Kaj post kiam oni permesis korespondi kun eksterlandanoj, mi jam ne havis ŝian adreson.

Estis bone, ke post 38 jaroj mi renkontis ŝian filon Ludwik Zaleski Zamenhof. En la 72-a UK li faris salutvortojn. Li diris, ke li partoprenas la kongreson ne kiel posteulo de L. L. Zamenhof, sed kiel ordinara esperantisto, ĉar Esperanto apartenas al la tuta homaro tuj post sia publikiĝo. Esperanto ŝuldas sian disvolviĝon al la Espuzantoj, sed ne al la familio de Zamenhof. Tio estas komplete

konforma al la spirito de D-ro Zamenhof, kiu rigardis kreon de nia lingvo ne sia propraĵo, sed la komuna riĉaĵo de la tuta homaro, kaj la homaro devas disvolvi ĝin en praktiko. Ankaŭ Ludwik observas tiun principon. Pro tio mi havas profundan respekton al li.

Tuj post la inaŭguro s-ino Inga-Maya konigis al mi siajn amikojn de la juneco.

“Ni ne estas fremdaj,” premante la manon de Ludwik, mi diris. “Mi konas vian patrinon. Ŝi iam rakontis al mi pri vi.” Je tio lia vizaĝo kovriĝis de malĝojo.

“Ŝi jam forpasis,” pli forte premante mian manon, li diris: “Mia patrino eskapis el la persekutado de nazioj, sed mortis en trafika akcidento.”

Pro korporemeco mi ne povis diri eĉ unu vorton. Gape mi rigardis al Ludwik. Li, altastatura kun maldensaj haroj, jam maljuniĝis. Li estas emerita inĝeniero de mar-navigacio kaj tre okupita. Li estas la lasta heredanto de la familio de L. L. Zamenhof.

Post la mallonga parolo ni disiĝis por partopreni kunvenojn de la

kongreso. Malgraŭ sia okupiteco, Ludwik invitis min rigardi la dramon “La vivo de Zamenhof” kaj ĝui koncerton. Ludwik, Inga-Maya kaj mi kune rigardis la dramon en Esperanto. La aktorino ludis la rolojn de la patrino de Zamenhof kaj liaj edzino kaj filino Lidia. Ili ĉiuj plene subtenis Zamenhof spirite kaj materie en kreado kaj disvastigo de nia lingvo. Kuraĝigate de siaj intimuloj, L. L. Zamenhof venkis diversajn malfacilojn kaj realigis sian idealon. Ilia aktivado spegulis la vivon de Zamenhof. Sidante apud Ludwik, mi estis forte infektita de la familia medio.

Ni triope iris al la muzika koncerto de Ŝopeno. Ni babilis pri nia ordinara vivo kaj interesaj pri la kongreso. Nur tiam mi trovis Ludwik tre humura. Parolante pri interesaj en la vivo, li ĉiam ŝajnis sin serioza, kio plifortigis la humorecon. Verŝajne, tion li heredis de sia avo. Laŭ fotoj, D-ro Zamenhof aspektas serioza. Tio tute ne signifas, ke li estis serioza. Se li estus tia, kial li havus tiel fortan amon al la homoj kaj kial li povus krei la facilan lingvon Esperanto, spite ĉian malfacilon kaj malhelpon? Liaj tradukaĵoj, kia “Fabeloj de Andersen”, montras, ke lia literatura stilo estas vigla kaj plena de vivetoso. Li certe estis homo plena de intereso pri vivo, tial en la kontaktiĝo kun lia nepo inĝeniero Ludwik mi akiris pli profundan komprenon pri D-ro Zamenhof mem.

Dum la kongreso mi loĝis malproksime de Inga-Maya kaj Ludwik, tial mi ne persone adiaŭis ilin. Inga-Maya sendis al mi slipon. El ĝi mi sciis, ke ŝi kaj Ludwik kun respekto vizitis la tombon de L. L. Zamenhof en Varsovio, kaj ke Ludwik deziras viziti Ĉinion kiel ordinara esperantisto.

Ĉi-foje, miaj renkontiĝo kun Inga-Maya kaj konatiĝo kun inĝeniero Ludwik ebligis al mi ne nur starigi novan amikecon kun familianoj de L. L. Zamenhof, sed ankaŭ profundigi mian komprenon pri ilia spirito. ■

# Provoj de kampara reformo

**M**IRINDAJN atingojn akiris la reformado en kamparo, komencita en Ĉinio antaŭ dek jaroj. Lastaj statistikoj montras, ke en la lasta jardeko multe kreskis agrikulturaj produktaĵoj, obliĝis ilia vendokvanto, kaj preskaŭ 60% de la produktaĵoj fariĝis komercaĵoj; ĉirkaŭ 90 milionoj da terkulturistoj sin turnis al kamparaj entreprenoj; enspezo de kamparanoj kreskis je 250%. Kamparo, kie memsufiĉa ekonomio regis dum longa tempo, nun surpaŝis la vojon de komercaĵa ekonomio.

En tiu esenca ŝanĝiĝo aperis novaj problemoj kaj kontraŭdiroj. Aŭtoritatuloj, kiuj konas la aktualan staton, malkovris, ke investo en agrikulturo estas malmulta, akvoutiliga instalajaro fortempiĝas kaj nekompletiĝas, la agro multe malpliĝas, tera fekundeco malaltiĝas, kaj al multaj kamparanoj mankas entuziasmo produkti grenojn. Ĉio ĉi tio kaŭzis, ke en la lastaj jaroj la produktokvanto de grenoj preskaŭ stagnis. La problemoj montris malfortecon de la ĉina agrikulturo — nesufiĉa potencialo por plia evoluo.

Ĝuste sur tia fono Ĉinio ekpraktikis grandiozan planon — fondi 14 eksperimentajn zonojn pri kampara reformo en 10 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Tie fakuloj kaj oficistoj direktas kamparanojn en eksperimentoj pri pluapaŝa reformo. La eksperimentoj celas rompi aktualajn barojn en kampara evoluo kaj trovi praktikan vojon por profundigi la reformadon.

## PRINCIPO: SCIENCA METODO

La eksperimentoj komenciĝis maje 1987. En la 10 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj jam fondiĝis koncernaj establoj. La 14 eksperimentaj zonoj kovras pli ol 20 guberniojn kun dek milionoj da loĝantoj.

La eksperimentoj iras en 8 temoj: agra sistemo, administrado de skalo, perfektigo de regularo en kamparaj entreprenoj, financo en kamparo, kamparaj kooperativoj, konstruo de bazlokoj de agrikulturaj komercaĵoj, vendo kaj aĉeto de grenoj, kaj administrado en ŝtataj farmoj kaj forstejoj.

En eksperimento pri ĉiu temo oni devas redukti la subjektivismon kaj fari ĉion strikte laŭ sciencaj procezoj. Unue oni vizitas kamparanajn familiojn por detale kaj plene enketi la aktualajn kondiĉojn kaj surbaze de la enketoj faras detalajn planojn. Post tio oni petas fakulojn fari ĉiuf flankan argumenton. Reviziite kaj aprobite de la Centro pri la Kampara Evoluo sub la Ŝtata Konsilantaro, la planoj estas transdonitaj al la praktiko.

La unujara eksperimentado jam donis okulfrapajn fruktojn en studo pri kelkaj temoj, kiaj konstruo de agra sistemo, administrado de skalo, perfektigo de regularo pri kamparaj entreprenoj.

Por ĉinaj kamparanoj tero signifas vivon. En la unua paŝo de la

kampara reformo, ĉiu kamparano ekhavis egalan porcion da tero por laŭkontrakte kultivi. Tio kvankam vekis labor-fervoron, tamen la terpecoj pri kiuj kontraktis kamparano ĝenerale estas tro malgrandaj kaj tia stato malhelpis aplikon de sciencaj teknikoj. Krome, kamparanoj sentis, ke ilia rajto de teruzo ne estas garantiita kaj tial ili ne bone zorgis pri la tero, ke ĝia fekundeco malaltiĝis. La gubernio Meitian (Mejtjan) en la provinco Guizhou (Gujĝoŭ) faris la eksperimenton pri agra sistemo. Ĝi ellaboris kelkajn novajn regulojn, laŭ kiuj la agro apartenas al la kolektivo, kaj kamparanoj devas doni lupagon por sia laŭkontrakte kultivata tero. Tio estigas ĉe la kamparanoj devkonscion pri sia tero. Kamparanoj povas mem decidi kontrakti aŭ ne kontrakti. Oni povas adjudiki sian kontraktitan teron al aliaj. Tio utilas al koncentriĝo de la tero ĉe lertaj terkultivistoj. Kamparanoj povas cedi sian rajton de teruzo al aliaj, postulante kompenson. Tio liberigas el ŝarĝo de terkultivo tiujn, kiuj sin okupas je kamparaj entreprenoj. Al la kamparanoj, kiuj penas fekundigi la teron, vilaĝaj instancoj premias per mono aŭ per certaj produktaj rimedoj.

En la gubernio Shunyi (Ŝunji) de Pekino glate iras eksperimento pri administrado de skalo. Tie la ekonomio estas evoluanta; prosperas la kamparaj entreprenoj, kaj multaj kamparanoj sin turnas al la dua kaj tria industrioj. Tio metis bazon por grandigi la administradon de skalo. La gubernia registaro

mobilizas diversflankajn fortojn por krei favorajn kondiĉojn por la grandskala administrado, interalie, oni establis publikajn servoretojn, liveris agrokulturajn maŝinojn, trejnis personaron, dank' al kio pli ol 90% de la tiea agro estas kultivata en pli granda skalo. 12 000 familioj laŭkontrakte kultivas po 2 hektarojn da tero. La enspezo de tiaj kamparanoj proksimume egalas al tiu de laborantoj en la kamparaj entreprenoj kaj superas tiun de malgrandskalaj ter-kulturantoj.

Alia eksperimento-temo pri perfektigo de regularo en kamparaj entreprenoj, sukcesis en la subprovinco Fuyang de la provinco Anhui. Tie troviĝas 200 000 kamparaj entreprenoj, kies plejparton funkciigas familioj kelk- aŭ dekelkope. Samkiel en aliaj lokoj en Ĉinio pro fortaj konceptoj etkamparana kaj genealogia, tie la interhomaj kontaktoj ligiĝas ĉefe per sangaj kaj lokaj rilatoj, sekve de tio la posedanteco de la entrepreno, devo kaj povo de fabrikestroj, ŝuldo kaj ŝuldigo, respondeco pri riska investo kaj entrepreno kaj distribua sistemo, ĉio estas malklara en la praktiko. Tial multaj entreprenoj "unuajare prosperas, dua-jare baraktas, kaj triajare pereas". Konstanta evoluo apenaŭ eblas. La eksperimentoj komenciĝis ĉe regularo de entreprenoj. Ili dividis en-

treprenojn en 8 bazajn grupojn: individu-kapitalaj, kontraktitaj, akciaj, kompaniaj, dependantaj de pli granda organizo, luitaj, profitkvotaj kaj asekuraj. Konsultinte avangardajn mekanismojn de administrado en- kaj eksterlande, oni ellaboris administrajn statutojn por la 8-specaj entreprenoj. La statutoj estis prove praktikataj en 8 entreprenoj kun kontentiga rezulto. La produktovalorero de tiuj 8 entreprenoj en 1988 kreskis je 50% kompare kun tiu en 1987. La provinca registaro nun disvastigas la spertojn tra la tuta provinco.

## GRUNDO POR KOMERCAJA EKONOMIO

La unua paŝo de kampara reformo faris la kamparanojn ĉefaj roloj en la administrado kaj ebligis al ili memdecide produkti. Sed tia familia produktoŝkalo pli kaj pli ne konformas al disvolviĝanta komercaja ekonomio. Tion ilustras abundo da faktoj:

En Yan'an de la provinco Shaanxi (Ŝenŝji), ĉirkaŭ dekmil kamparanaj familioj senkonsidere entreprenis kuniklo-bredadon, sekve la merkato saturiĝis. Multaj homoj dronis en ŝuldo.

En Wenjiang (Ŭengĵang), provinco Sichuan (Siĉŭan), 20 000

kamparanaj familioj kulturis mandarinarbojn, sed pro manko de koncernaj rimedoj pri transportado kaj vendado, granda kvanto da mandarinoj putriĝis...

De tago al tago akriĝas la kontraŭdiro inter malgrandskala produktado kaj la granda merkato. Al la dise loĝantaj kamparanoj mankas ĝisdataj informoj, monrimedoj kaj kanaloj de vendado kaj aĉetado. Ili ne povas elteni eventualajn riskojn en merkato. Eksperimentoj kontraŭ tiuj problemoj estis faritaj en la gubernio Yutian de la provinco Hebei kaj la gubernio Shangzhi de la provinco Heilongjiang (Hejlongĝĵang).

En Yutian oni reordigis vilaĝajn ekonomiajn organizojn, kiuj jam paraliziĝis post la unuapaŝa reformo, kaj fondis novajn fakajn kooperativojn, kiuj kiel modeloj kaj perantoj servas al la kamparanoj. Nun 97% de la vilaĝoj de la gubernio jam havas siajn kooperativojn, plejparto de ĝiaj subdistriktoj havas kombinatan kooperativaron. Tiaj organizoj liveras al kamparanoj merkatajn informojn, teknikojn, agrokulturajn maŝinojn, monrimedojn k.a. Filio de la brutbreda buroo de la gubernio kontraktis kun 50 porkobredantoj en 1987. Malgraŭ fluktuo en la merkato, ĝi pagas protektan prezon por la vendataj porkoj. Ĝi hel-

Tablotenisaj pilkoj fabrikataj de kamparanoj de Shenyang. Duono de ili estas eksportata.

Sur draŝejo





pas la bredantojn per riskofonduso en la produktado. Nun en la gubernio troviĝas jam 1 200 porkobredantaj familioj.

Ankaŭ perfektigo de regularo, kiu estas egale grava kiel organiza konstruo, estas nepra kondiĉo por evoluo de komercaja ekonomio. Ekzemple, manko de reguloj pri uzo kaj transdono de tero kaŭzis, ke iuj kamparanoj, ne volante fekundigi la teron, faris rabecan produktadon, dum aliaj lasis sian teron dezertiĝi post kiam ili sin ekokupis en la dua aŭ tria industrio. Aliflanke, multaj lertaj terkultivistoj havas nur malmulte da tero. Sen necesaj regularoj ankaŭ la kamparaj entreprenoj ne povis kreski sane.

Frapa aktuala demando estas, ke kamparanoj dubas, kiom longe validos la nunaj politikoj. Eksperimentoj en Wenzhou de la provinco Zhejiang temas ĉefe pri ellaboro de koncernaj regularoj rilate al individuaj, privataj kaj akciaj ekonomiaj organizoj. Antaŭe, kiam la kapitalo de privata entrepreno atingis centmilon da juanoj, oni ne kuraĝas pliigi la kapitalon, timante senvalidiĝon de nunaj politikoj. Post kiam la eksperimenta zono ellaboris "Provizoran regularon pri privataj entreprenoj", trankviliĝis la



Salikaĵoj faritaj de kamparanoj en Qingtongxia, Ningxia kamparanoj.

## REFORMOJ EN SAMTAKTAJ PAŜOJ


La ĉefa enhavo de la unuapaŝa kampara reformo estis forigi egalisman distribuon, estigi novan mikroekonomian organismon en kamparo, kaj tiel havigi al kamparanoj memdecidan povon en produktado. Tiu reformo apenaŭ tuŝis rearanĝon de interesoj de diversaj flankoj, tial ĝi estis certa-

grade sendependa, kaj estis apenaŭ influata de eksteraj aferoj. La nuna paŝo de reformo estas tute alia afero. Ĝi ĉefe celas puŝi ĉinan kamparon karakterizitan de etkamparana ekonomio dum miloj da jaroj sur la vojon de komercaja ekonomio. Tio postulas koncernajn reformojn en komercado, prezoj, imposto, financado, materialdono k.a. La nuna reformo en kamparo ne povas iri unuope kiel la unuapaŝa reformo. Ĝi certa- grade dependas de la disvolvigo de la reformo de ekonomia mekanismo en la urboj. ■

Rikolto de tritiko per maŝinoj



# Vojaĝo laŭ la malnova fluejo de la Flava Rivero



Agronomo kontrolas pomojn.


EN la pasintaj 2000 jaroj la malsupra parto de la Flava Rivero breĉiĝis 1 500 fojojn. La rivero ŝanĝis sian fluejon 25 fojojn kaj la lasta ŝanĝo okazis en 1855. Antaŭ tio la rivero fluis de okcidento al oriento. Veninte al Lankao-gubernio de Henan-provinco, ĝi daŭre fluis orienten al la urbo Xuzhou (Ŝjuĝoŭ) de Jiangersu (Ĝjangersu)-provinco, trafluis ĝin kaj kuris al la Flava Maro. En 1855 la Flava Rivero ŝanĝis sian fluejon, nome ĝi komencis flui nordorienten de Tongwaxiang (Tongŭaŝjang) de Lankao-gubernio, preterflui la urbon Jinan (Ĝjinan) de Shandong-provinco kaj enflui en la Flavan Maron.

La Flava Rivero havas multe da ŝlimo. Post la ŝanĝo de la fluejo ĝia antaŭa vojo sekigis kaj fariĝis sabla zono kun longo de 700 kilometroj, etendiĝanta

Rikolto de piroj



Teksto de ZHENG ZHENJIE  
Fotoj de WANG JIANBAO kaj ZHOU QINJUN



Piroj de Dangshan

tra la provincoj Henan, Shandong, Anhui kaj Jiangsu. La zono ja estas la fama malnova fluejo de la Flava Rivero. Antaŭ 40 jaroj tie troviĝis sennombraj moviĝemaj sablomontetoj. En sekaj vintro kaj printempo ventego kaj sablo furiozis kaj damaĝis plantojn. Estas loka popolkanto:

*Tuj leviĝas vento, flugas sablo,  
Tage lampo lumas en la domo.  
Ve, pasanto jam ne vidas vojon,  
La plantidojn jen englutas sablo.*

En la malfrua aŭtuno de la pasinta jaro mi vizitis Lankao, Minquan (Minĉjūan), Dangshan kaj Xuzhou. Tie mi vidis alian aspekton. La furiozeco de ventego kaj sablo jam fariĝis pasintaĵo.



Aktinidioj (*Actinidia chinensis*)

Vinbergardeno sur la malnova fluejo de la Flava Rivero



Persimonĝardeno





Paŭlovnioj en kamparo

## “VERDA BANKO”

Tiutage mi veturis per aŭto de Tongwaxiang al oriento. Tra fenestro mi vidis, ke vico kaj vico da paŭlovnioj staras en kampoj, apud ŝoseo kaj ĉe rivereto. Agrikultura teknikisto, mia akompananto, diris al mi, ke kamparanoj de Lankao kaj Minquan plantis paŭlovniojn ambaŭflanke de la malnova fluejo de la Flava Rivero. Ili plantis paŭlovniojn paralele kun agrikulturaj plantoj sur 700 000 hektaroj da kampoj. Ili posedas 200 milionojn da paŭlovnioj. Ĉiu havas meznombre 33 paŭlovniojn. Ĉiuprintempe la proksimaj kaj malproksimaj paŭlovnioj donas purpurajn, rozajn kaj blankajn florojn, kiuj multe beligas la lokon.

Paŭlovnio estas arbo kun profundaj radikoj taŭga por kreski en sabla grundo. Ĝi folias malfrue kaj perdas foliojn frue. Ĝi preskaŭ ne malhelpas la kreskadon de agrikulturaj plantoj kaj tial taŭgas por paralela kreskado kun ili. Dank’ al paralela plantado en vastaj kampoj la produktokvanto de tritiko pliiĝas je 6-23%, ĉar paŭlovnioj kun prosperaj frondoj povas malgrandigi la rapidecon de vento, kreskigi la humidecon de la aero, redukti la vaporigan kvanton kaj ŝirmi de seka kaj varma vento.

Mi vizitis kultivejon ĉe la malnova fluejo de la

Flava Rivero. La tria filio de la kultivejo havas 20 hektarojn da tritikkampoj. Ĉar ĝi tute efektivigis paralelan plantadon, la hektara produktokvanto de unufoje rikoltita tritiko kreskis de 2750 kg. al 5625 kg. La ligno de paŭlovnio ne aliformiĝas, nek fendiiĝas, sed rezistas kontraŭ putro kaj malsekeco. Ĝi estas bona materialo por trabo kaj meblo kaj ankaŭ ĉefa materialo por muzika instrumento. Ĝi kreskas tre rapide kaj maturiĝas post kvin jaroj. Estas interese, ke ĝi kreskas plej rapide en la 8-a jaro. La kvanto de la ligno kreskinta en tiu jaro superas tiun kreskintan en la antaŭaj 7 jaroj. Post la paralela plantado ĉiu kamparano ĉiujare povas pliigi sian enspezon je 750 juanoj, se li havas 75 paŭlovniojn en ĉiu hektaro. La tieaj kamparanoj ĉiujare hakas grandan nombron da paŭlovnioj kaj eksportas 10000 kubmetrojn da ligno. Paŭlovnio estas nomata de ili “verda banko”.

## EN GUBERNIO DE PIROJ

La aŭto veturis orienten laŭ la malnova fluejo de la Flava Rivero kaj portis min al Dangshangubernio en norda Anhui-provinco.

La aŭto malrapidiĝis, kiam ĝi veturis tra vilaĝoj. Mi vidis multajn piro-standojn sur stratoj kaj stra-

teĵoj. Pasantoj iris kun piroj en mano aŭ sur ŝultro. Veturantaj aŭtoj kaj ĉeval-ĉaroj ŝarĝiĝis per korboj aŭ kestoĵ da piroj. Iu pasaĝero diris al mi, ke Dangshan estas fama ĉina gubernio de piroj. Fruktarba zono sur la malnova fluejo de la Flava Rivero etendiĝas 40 kilometrojn kun areo de 23 000 hektaroj, el kiuj 7 700 hektaroj apartenas al piroĝardeno kaj ĉiujare produktas 70 milionojn da kg. da piroj.

Baldaŭ mi venis en piroĝardenon de Helouvilago, Liangli-subdistrikto, kaj vidis, ke vico kaj vico da pirarboj estas same altaj kaj tre ordaj. La hele flavaj piroj sin kaŝis en densa verdaĵo. Ili estis pezaj kaj kurbigis la branĉojn. Mi promenis en la piroĝardeno. Je eta malatento la kapo kaj ŝultroj jam tuŝis pirojn. Pro laciĝo mi sidiĝis aŭ simple kuŝis sur la tero. Se mi etendis brakon, mi povis tuŝi piron. La akompananto deprenis piron kun pezo de 0.5 kg. kaj donis al mi por gustumi. Mi mordis ĝin kaj trovis ĝin dolĉa kaj delikata, tiam bongusta suko tuj fluis laŭ miaj fingroj.

Dangshan vere estas gubernio de piroj. En ĉiuj lokoj, kiujn mi vizitis, mi vidis ne nur grandajn piroĝardenojn, sed ankaŭ piroplenajn kelojn en la kortoj de ĉiuj familioj. Hazarde mi eniris en hejmon kun malfermita pordo. Ekvidinte min, la gastama mastrino Zou Huayun tuj malfermis kranon, purigis korbon da piroj kaj prezentis ilin al mi. Dum nia babilado mi sciis, ke ŝi havas 4 infanojn. Ŝi kaj ŝia edzo laŭkontrakte kulturas 125 pirarbojn, kaj ilia jara pokapa enspezo estas 2 500 juanoj. Ili konstruis malgrandan etaĝdomon per 30 000 juanoj. La familio de Zou Huayun ne estas unika. Ŝia vilago konsistas el 26 familioj kun 130 personoj, kies pokapa enspezo en 1988 superis 2 500 juanojn, 8-oble pli multe ol tiu en 1980.

## EN INSTITUTO PRI FRUKTARBOJ

Dum la vojaĝo de Dangshan al Xuzhou mi restis kelkajn horojn en instituto pri fruktarboj. La instituto servas al hortikulturistoj ĉe la malnova fluejo de la Flava Rivero.

La instituto havas 19 personojn. En la pasintaj 8 jaroj ili akiris grandajn sukcesojn en vinberkulturo en sabla regiono, en konservado de piroj de Dangshan kaj en batalo kontraŭ fiinsektoj sur fruktarboj kaj ricevis premiojn de la provinco kaj la Agrikultura Ministerio.

La hektara produktokvanto de unufoje rikoltitaj frumaturaj piroj de Dangshan kulturataj de la instituto atingas 45 000 kg. kaj krome tiaj piroj maturiĝas 40 tagojn pli frue ol la lokaj ordinaraj piroj. Ili estas bonvenaj en la merkato de Hongkongo. Yu Daoping, altklasa agronomo de la instituto, diris al mi, ke ili elpensis metodon de piro-konservado, t.e. konservi

pirojn en kelo, kiu duone estas sur la tero kaj duone sub la tero. Por konstrui tian kelon, oni bezonas iom da labor-forto kaj elspezas tre malmulte da mono. La temperaturo en la kelo estas inter 2-20°C. Post kiam tia kelo estas popularigita en Dangshan kaj aliaj lokoj, hortikulturistoj povas konservi fruktojn ĝis la sekvanta printempo, altpreza sezono por fruktoj. Tio povas sendube pliigi enspezon de hortikulturistoj. Yu Daoping diris al mi ankaŭ, ke la eksperimenta fruktoĝardeno de la instituto kovras areon de 53 hektaroj. La ĝardeno ĉiujare produktas 1.5 milionojn da kg. da fruktoj. Tie troviĝas multaj specoj de fruktoj, inter kiuj estas ne nur ĉinaj specoj, sed ankaŭ pli ol 10 bonaj specoj enkondukitaj el aliaj landoj. ■

Akvomelonkampo en somero



# Martaj kantoj de ĝŭangoj

Teksto de YUAN CHENG

Fotoj de MA YAMIN

**L**A Guangxi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono, kiu, situas en suda Ĉinio, ĝuas honoran nomon “kanta maro”. La tria de la tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro, estas kanta festo de ĝŭangoj.

En tiu tago ĝŭangoj sin vestas per festa kostumo kaj brodita kaptuko, ŝultre portas ĝŭang-brokajĵan sake-ton, kun bunta ombrelo super la kapo, flora korbo ene kun ĝŭang-brokajĵo, brodita globeto kaj kvin-

kolora glurizaĵo. Al kantejo ili venas el diversaj lokoj, malgraŭ la vojo malfacila kaj longa. Estas grandioza la spektaklo de interkantado, ke junuloj kaj maljunuloj interkantatas tri-kvin-ope. La Kanta

Antaŭ interkantado





Interkantantaj gejunuloj

Festo de ĝuang-nacio havas historion de pli ol mil jaroj. Legendo diras, ke en antikveco vivis bela kantistino, nomata Liu Sanjie (Liŭ Saŝĝje). Ŝi estis popolama kaj malmamika al fiuloj. Ŝi laŭdis laboron kaj amon kaj malkaŝis maljustaĵojn per kantoj. Firiĉulo intencis perforte preni ŝin kiel sian edzinon. Liu Sanjie faris reziston per sia kanto, malkaŝante fifaron de la riĉulo. La riĉulo koleris kaj mortigis Liu en la tria de la tria monato. La ĝuangoj tre amas ŝin kaj opi-

Knabino en interkantado



Nacia danco





Gustumo de kvinkolora glurizaĵo en la festo

nias, ke ŝi ne mortis, sed fariĝis kanta feino. Poste, la tria de la tria monato fariĝis kanta festo de la ĝuangoj.

En kantejo gekantistoj faras konkurson en formo de kantaj demandoj kaj respondoj. La vortoj ĝenerale estas improvizitaj laŭ sia-tempaj konkretaj cirkonstancoj. En kantado ili ofte uzas metaforon, alegorion, enigmajn demandojn kaj rakontadon pri historiaj kaj nuntempaj okazoj. La tekstoj estas lerte teksitaj kun trafaj metaforoj, profunda signifo kaj vasta enhavo. Foje oni ne povas decidi venkinton de la konkurso eĉ post du-tri-taga seninterrompa kantado.

Plej poezia estas la amatoelektado de ĝuangaĵoj. Junuloj kaj junulinoj en du grupoj interkantas unuj kontraŭ aliaj ĉe vojo, sur montodeklivo, sur herbejo, apud rivero aŭ sub arboj. Komence ili reciproke demandas per kantado pri familio, ŝato por sonde saĝon de sia elektoto. La demandoj estas ofte limigitaj ne nur pri ĉiutaga vivo, sed ankaŭ pri floroj, birdoj, arboj, astronomiaj kaj geogra-

fiaj scioj, historiaj rakontoj, novaĵoj k.a.

En interkantado, la knabinoj elmetas sian delikate broditan globeton. Ĝi estas farita el indieno kaj ene kun kotonsemkj. Ĝi surhavas broditajn flordeseĝojn kaj ligiĝas per silka bendo je 60 cm. longa. La globeto simbolas la amon

La kantantino pelas la kantantojn en senelirejon.



de ĝuanga knabino. Interkantinte, knabino ĵetas sian globeton al la ŝatata junulo. La junulo, kaptinte la globeton, tuj reĵetas ĝin al la knabino. Kaj ili sin distras per globjetado. Se la junulo ŝatas la knabinon, li do alligas sian donacon al la globeto kaj ĵetas ĝin al ŝi. Kiam ŝi akceptis la donacon, ili do forlasis la amasan kantejon kaj iris al kvietaj loko por daŭrigi la amoespriman interkantadon. Ĝis sunmalleviĝo, la amanta paro ekkantas adiaŭnan kanton. Post kiam la amanta paro faris plurajn rendezvojn kaj plenumis la reciprokan komprenon, la amo maturiĝis, ili do fondis feliĉan familion.


Dum la Kanta Festo ĝuangoj manĝas kvinkoloran glurizaĵon, sidante cirkle. La rizaĵo havas kolorojn ruĝan, flavan, bluan, nigran kaj blankan, ĝi estas kolorigita per sukaj de vegetaĵoj. Tio simbolas brilan perspektivon de la nacio.

Venas vespero. La celebrado de la festo atingas sian kulminon, Kongming-lanternoj (primitiva ĉina termobalono) kaj buntaj fajraĵoj flugas al la ĉielo kaj beligas la festan nokton. La konkurstantoj interkantas pli varme, de tempo al tempo leviĝas gajaj paroloj kaj ridoj. ■



# ĈINA OCEANO- GRAFIA STA- CIO SUR NANSHA- INSULARO

Teksto de **SUN GUOLIANG**  
Fotoj de **WANG JINSHENG**



Dragŝipo en laboro

**E**N la ocean-monitora sistemo de la tuta terglobo, la Suda Ĉina Maro de longe estis vaka loko. Antaŭe, tie estis nur provizora regiona hidrologia stacio, kiu ne povis ĝustatempe provizi la tutmondan ocean-monitoran sistemon de la tuta terglobo per diversaj donitaĵoj. En la 14-a kunveno en Parizo en marto 1987, la Oceanografia Komitato de UN oficiale komisiis al Ĉinio fondi du eternajn oceanografiajn staciojn n-roj 74 kaj 76, en Nansha-insularo en la Suda Ĉina Maro.


Post kiam ĉinaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj faris al Nansha-insularo sintezan esploron de topografio, hidrologio, meteorologio, kemio, vivaĵoj, geologio k.a., la

ĉina registaro decidis konstrui la unuan modernan oceanografian stacion sur Yongshu-atolo de Nansha-insularo.

Yongshu-atolo estas rifa benko kun areo de ĉ.100 kvadrataj kilometroj, sin kaŝas sub la senlima ondaro, jen aperas jen malaperas

Provado de observaj aparatoj

Foto de **LONG YUNHE**





Konstruejo de la oceanografia stacio sur Yongshu-atolo



Havenbaseno

laŭ la leviĝo kaj malleviĝo de markvo. Kiam altas tajdo, videblas nur 3 ŝtonpecoj kun totala areo de 1.5 kvadrataj metroj. Tial, la kon-


struado de la oceanografia stacio sur Yongshu-atolo estis farita subakve. La konstruantoj devis fari fosojn por la bazo de stacio, kon-

strui havenbasenon, ebenigi terason, poste starigi domojn kaj diversajn aparatojn kaj instalaĵojn. Tial la konstruado estis tre komplika, peniga kaj danĝera. Ekzemple, laŭ ordinara laborpostulo la subakva eksplodigo devas esti farata en vento sub kvara grado kaj en ondaro malpli ol 1.5 metrojn alta. Sed tie ĉiam estas la sepagrada ventado kaj ondaro alta je 5 metroj. La ventego kaj ondaro puŝis ŝipojn de miloj da toneloj jen tien jen alian, la konstruantoj ne povis ne malobservi la ordinaran regulon kaj faris la laboron subakve. Krome, ferocaj ŝarkoj minacis la subakvistojn.

Kvankam Ĉinio sendis tien plej spertajn laboristojn kaj plej bonajn ŝipojn, tamen dragŝipo dutage elfosis nur koralrifan pecon grandan kiel lavkuvo, kaj eĉ tio derompis dentojn de la fosilo, ĉar Yongshu-atolo konsistas el tre malmolaj koralaj rifoj. Poste ili aplikis eksplodigan metodon por fosi rifon. Por forigi rifaĵojn eksplodigitajn de 1-tuna dinamito necesis 2-3-taga laboro de la dragŝipo. Tiamaniere ili laboris kvar monatojn, subakve eksplodigis rifon 40 fojojn, kaj finfine elhakis subakvan navigan vojon longan je centoj da metroj.

La malbonaj meteorologiaj kondiĉoj ofte kaŭzis al la konstruado neatenditajn malfacilojn. Kiam oni fosis la havenbasenon longan je pli ol 200 metroj kaj faris ordigon al la fosita bazo, blovis ventego dek tagojn ĉe Yongshu-atolo. La maraj ondoj ne nur repuŝis la fositajn rifaĵojn en la fositan havenbasenon, sed ankaŭ faligis la artefaritan terason ebenigitan de buldozo. Post kvietiĝo de ventego kaj ondo oni devis rekomenci sian laboron. Kiam ili denove elfosis la repuŝitajn rifaĵojn per dragŝipo, pli multaj okupiĝis pri konstruado de digoj. Per pli ol dek miloj da jutaj sakoj kun sablo kaj ŝtonetoj, ili konstruis ekster la havenbaseno digon longan je 500 metroj, por bari la fortajn ondojn.


Post pena laborado de 189 tagoj, artefarita insulo aperis en Nansha-insularo kaj nova etaĝdomo aperis sur Yongshu-atolo. La unua ĉina oceanografia stacio estis konstruita en la Suda Ĉina Maro. En la 3-a de aŭgusto 1988 la nomita stacio oficiale fariĝis parto de la oceanografia reto de la tuta terglobo. La hidrologiaj kaj meteologiaj donitaĵoj akiritaj de tiu oceanografia stacio estas senĉese senditaj al oceanografiaj centroj sur la terglobo por liveri materialojn al la tutmonda oceanografia esplorado kaj la homa racia ekspluato kaj utiligo de la oceanoj. ■



Nova oceanografia stacio

Konstruado de kajo

Foto de XU YIBING



# Ĉu eŭtanazio estas pravigebla?



La detektiva romano "Dum Vi Estis kun Ni"

*DUM VI ESTIS KUN NI* originala detektiva romano de Istvan Nemere, eldonita de Oy Mendoservo AK (Finnlando) kaj la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 20 x 12.5 cm. 165 p. Prezo ne montrita.

Juna prokuroro ricevis anoni-majn leterojn, per kiuj oni denunci-s virinon pri murdo de la patrino. La prokuroro faris enketon al ŝia najbaro kaj informiĝis, ke la patri-no mortis de malsano kaj la denun-cinto probable skribis la leterojn pro rankoro kontraŭ la akuzitino pro ŝia rifuzo vendi la ĝardenon de la patrino al li. La prokuroro plue enketis al la kuracisto kaj flegistino, kiuj okupiĝis pri la aĝa pacien-tino, kaj ĉi tiuj informis lin, ke ŝi suferis de kancero tre turmenta en la lasta stadio kaj ili devis injekta-di al ŝi morfinon. Fine li pride-mandis la filinon pri la morto de ŝia patrino, kaj tiu ĉi konfesis, post psikaj bataloj, ke ŝi "mortigis" la nekuraceblan patrinon, laŭ ŝia de-ziro, per injekto de tro granda dozo da morfino. Laŭ la prokuroro,, tia eŭtanazio estas krimo kaj la filino devas submetiĝi al juĝo. Sed pastro kaj kuracistino opiniis, ke tia faro ne signifas murdon, sed agon de

amo kaj kompatio. Ankaŭ la patri-no de la prokuroro samopiniis, ĉar ŝi mem devis doni tian "helpon" al sia fileto, kiu suferis de tumoro en la ĉerbo. Kion fari? La juna proku-uroro devis plenumi sian devon kaj aresti la junan virinon pro la "mur-do", kvankam ankaŭ li, je la fino, fariĝis simpatia al la "krimulino", kiu trankvile sekvis lin al la juĝejo. Jen vi jam scias, pri kio temas tiu nova romano de nia fekunda ver-kisto Istvan Nemere.

Kion diras la leĝoj de via lando pri tia afero? Kiel vi opinias pri la aresto? Ĉu tiurilate oni povus krei internacie aplikeblan leĝon racian? Mi kredas, ke tre diversaj povas esti la opinioj pri tio, ĉar ja tiel komplika estas tia afero. Se leĝo eksplicite aprobus eŭtanazion, eble iuj fiuloj vere "murdu-s" siajn gepa-trojn aŭ gefratojn en malsano por alproprigi al si iliajn posedaĵojn. Komprenebla afero, ke la aŭtoro ne donis eksplicite sian opinion pri la problemo.

Kvankam la romano ne havas komplikan intrigon, kiel kutime la detektivaj romanoj, tamen ĝi estas "ekscitite legiga", kaj refoje mon-

tras al ni la lertecon de la verkisto en teksado de rakonto.

Pri la lingvaĵoj, preskaŭ ne necesas komentoj al la malnovaj legantoj de verkoj de la aŭtoro. Ankaŭ en tiu ĉi romano li klopo-das por interesi la legantojn per freŝaj sukaj esprimoj. Mi devus ri-markigi, ke enŝteliĝis en la tekston krom preseraroj, kelkaj lingvaj mi-suzoj, kiel ekzemple, p. 17 "La in-fanmondo etendis (anstataŭ **eten-digi-s**) kvazaŭ ĝis la horizonto", p. 29 "Ĉu vi ne volas iom kuŝiĝi (an-stataŭ **kuŝi**) post la tagmango?", p.35 "ŝi estis kontraŭflanke de la stacidomo, aliris ĝin tra (anstataŭ **trans -on**) la reloj", p. 72 "Ili jam trinkis la duan tason de (anstataŭ **da**) kafo kun lakto...", p. 78 "vi murdis sian (anstataŭ **vian**) patri-non". Mi trovis ankaŭ vortojn fremdajn eĉ al PIV, pri kiuj oni devus doni klarigojn. Ĉar ĉiam no-vaj generacioj de esperantistoj es-tas kulturataj per la literaturo, mi forte deziras elsarkon de la mis-kreskaĵoj en la verda ĝardeno. Tam-en mi tute ne deziras malfortigi mian rekomendon pri la romano al ĉiuj legemuloj kaj libroamikoj.

Recenzis LAŬLUM

WU JIN:

# Normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio — nepra tendenco

**E**N la lasta periodo multaj signoj montris, ke eble proksimiĝos la longe parolata renkontiĝo de la ĉinaj kaj sovetuniaj altrangaj gvidantoj. Tamen, la internaciaj publikaj opinioj pri tio estas diversaj: la plimulto aprobas normaligon de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio, sed iuj dubas.

La aprobantoj nature havas sufiĉajn motivojn: Ĉinio kaj Sovetunio estas la plej grandaj landoj de Eŭrazio. Ili havas ĉ. 1 300 milionojn da loĝantoj, kiuj konsistigas pli ol 1/4 de la totala loĝantaro de la mondo, kaj kovras areon de 32 milionoj da kvadrataj kilometroj, kiu konsistigas proksimume 1/4 de la totala tera areo de la mondo. Efektivigo de rilata normaligo inter la du "kolosoj" sendube havas gravan signifon por likvidi malkvietan faktoron de la regiono kaj defendi la mondan pacon.

En la mezo de la 80-aj jaroj, kun la malstreĉiĝo kaj pliboniĝo de la rilatoj inter Usono kaj Sovetunio, ekaperis malstreĉiĝa tajdo en la mondo. Iuj aziaj, afrikaj kaj mez-orientaj regionoj, kie regas "alta temperaturo", "malaltiĝas temperaturo". Iuj disputataj problemoj solviĝas per konsiliĝo kaj interparolo. Se Ĉinio kaj Sovetunio efektiviĝos rilatan normaligon kaj kune sin dediĉos al la monda paco kaj disvolviĝo, tio certe pluapase antaŭenpuŝos disvolviĝon de la malstreĉiĝa tajdo. Tia perspektivo, kompreneble, estas bonega afero por la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio kaj ankaŭ de aliaj mondpartoj.

Sed, aliflanke oni devas rekoni, ke la dubo pri tio estas komprenebla. Ĉar Ĉinio kaj Sovetunio havas saman politikan kaj socian sistemon; la nova Ĉinio iam staris ĉe la flanko de Sovetunio en la unua periodo post sia fondiĝo; en la milito inter Koreio kaj Usono kaj tiu inter Vjetnamio kaj Usono, Ĉinio

kaj Sovetunio ja staris ĉe la sama batalfronto. Hodiaŭ, la internaciaj rilatoj estas en granda reguligo. Ĉu inter Ĉinio kaj Sovetunio reaperos "miela tempo" de la 50-aj jaroj? Ĉu la du "komunismaj kolosoj" refoje mano en mano kontraŭstaros al la okcidentaj evoluintaj landoj?



La 1-an de decembro Qian Qichen, ministro de eksteraj aferoj de Ĉinio, atingis Moskvon por fari oficialan viziton al Sovetunio. En la flughaveno lin bonvenigas Eduard Shevardnadze, ministro de eksteraj aferoj de Sovetunio.

Kvankam tiu dubo estas komprenebla, tamen oni ne bezonas maltrankviliĝi pro tio.

Ĉar la internacia situacio estas tute diferenca de tiu en la pasinteco, klik-politiko kaj hegemoniismo jam troviĝas en sakstrato. Se Sovetunio kaj Usono, du grandaj potencoj, konsciis, ke la kontraŭstaro dum dekoj da jaroj kaŭzis grandan perdon kaj estas malfacile daŭrigota, sekve de tio ili devas anstataŭigi

kontraŭstaron per interparolo, oni do ne povas imagi, ke en la nuna tempo Ĉinio subtenos unu flankon kaj kontraŭstaros al la alia flanko.

Ĉinio, Usono kaj Sovetunio estas nomataj "strategia triangulo". La rilatoj inter Ĉinio kaj Usono jam normaliĝis antaŭlonge, kaj la streĉiteco inter Usono kaj Sovetunio mildiĝas iom post iom. Tiukaze normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio estas na-

tura disvolviĝo. Fakte, se la tri grandaj landoj tenas normalajn rilatojn inter si, tio havas gravan signifon por la monda paco.

Due, historiaj faktoj pruvis, ke diplomata politiko de ĉiu ajn lando estas decidita unue de la intereso de la propra lando, sed ne de ĝia ideologio. Estas konate, ke la Dua Mondmilito komenciĝis ne inter landoj kun malsama socisistemo. Post la milito ofte okazis disputoj, kontraŭstaro, eĉ milito inter landoj kun sama socisistemo. Ni prenu la rilatojn inter Ĉinio kaj Sovetunio kiel ekzemplon. La rilatoj inter ili ĝis nun ankoraŭ ne normaligiĝis, ĉar ekzistas iuj faktaj obstakloj, el kiuj neniuj rilatas al ideologio. Nun ambaŭ flankoj iras al rilata normaligo ne pro ideologia sameco, sed pro tio, ke Sovetunio konsentas likvidi tiujn obstaklojn. Tial oni neeviteble faras eraran konkludon, se oni observas la disvolviĝan tendencan de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio ankoraŭ per koloraj okulvitroj de ideologio.

Trie, memstareco kaj pordmalfermo estas nacia politiko de Ĉinio, sed ne provizora rimedo. La tiel nomata memstareco estas, ke Ĉinio ne alianciĝas kun ĉiu ajn granda klico; la tiel nomata pordmalfermo estas, ke ĝi faras interŝanĝon kaj kunlaboron kun ĉiuj landoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, en politiko, ekonomio, scienco, tekniko, kulturo kaj aliaj kampoj. Ĉinio estas granda lando, sed postiginta en ekonomio. Ĝia elirejo estas plenergia disvolvo kaj efektiviĝo de kvar modernigoj en paco. Tial, Ĉinio ĉiam opinias, ke ĉiuj landoj devas disvolvi amikan kaj kunlaboran rilatojn surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto. Ĉinio volas amikiĝi kun ĉiuj landoj, sed ne male.

Nia epoko antaŭeniras. Malstreĉiĝo, interkonsiliĝo kaj interparolo fariĝas ĉefa melodio de nia epoko. Normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Sovetunio estas volo de la popolo kaj natura tendenco.

## POR KOMENCANTOJ

WIESLAWA PARYS (Pollando):

# La aŭtobiografio

*La aŭtoro estas komencanto, kiu finis la kurson de Esperanto de la unua grado. "La aŭtobiografio" estas ŝia ekzamena skriblaboro. Ni aperigas ĝin ne nur pro tio, ke ĝi, interesa kaj facile komprenebla, taŭgas al niaj komencantoj, sed ankaŭ por gratuli la aŭtoron pro ŝia sukceso en la lingvolernado.*

La Red.

**M**I nomiĝas Wieslawa Parys. Mi naskiĝis en la Sankta Sabato, la dudekan de aprilo en la jaro mil naŭcent kvindek sepa, dek minutojn post la oka, en Elblag. Mi pezis tri kilogramojn kaj kvarcent gramojn kaj mi estis kvardek ok centimetrojn longa. Mi estis la malplej alta en nia familio.

La printempo tiujare estis malvarma. Ĉiutage ventis kaj pluis. La suno brilis nur tiam, kiam mia panjo estis proksime ĉe mi kaj karesis min. Tiam mi havis multe da tempo kaj ne mankis al mi mono... Mi ne devis ellitiĝi matene kaj iri al laborejo, mi ne intencis kuiri tagmanĝon kaj ne povis senpolvigi la loĝejon.

Miaj gepatroj opiniis, ke mi estas la plej bela kaj bona el ĉiuj infanoj. Mi samopiniis kun ili, al mi ankaŭ plej plaĉis mi.

Se mi ekdancis, tiam miaj gepatroj ĝojis, ke mi estas muzikema. Se mi desegnis sur la muroj en la ĉambro, tiam ili parolis, ke mi estas talenta kaj mi estos fama artistino.

Mia lernado, komencita en la elementa lernejo, daŭris dek ses jarojn. Lernante en la mezlernejo, mi ofte restadis en leĝejo; studante en la universitato, mi ankoraŭ pli ofte iradis al leĝejo. Nun mi vizitas leĝejon ĉiutage. Mi estas bibliotekistino kaj laboras en la biblioteko, kiu troviĝas en la gotika kastelo, en Ketrzyn.

Mi loĝas en Ketrzyn de ok jaroj. Oni diras, ke ĝi estas malbela urbo, sed mi ŝatas la malnovajn domojn starantajn laŭ la strato de W. Sikorski kaj la Preĝejon de Sankta Georgo, kiu estas vere vizitinda. Mi ekŝatis ankaŭ multe da personoj, kiuj estas loĝantoj de Ketrzyn.

Mi kun mia edzo loĝas en la nova kvartalo, ĉe la strato Chrobry, numero dek sep. Ni havas du ĉambrojn, kuirejon, antaŭĉambro, banĉambro kaj necesejon. Mi povas kalkuli la meblaron kaj aliajn objektojn en nia hejmo, interalie la glaciŝrankon, lavmaŝinon kaj koloran televidilon, sed mi timas, ke leganto de la aŭtobiografio ekdormos, eble li aŭ ŝi jam dormas.

Mia vivo ne estas enua, ĉar mi interesiĝas pri legado de libroj. Mi povas ĉiutage vojaĝi, ne forlasante la hejmon. Vere mi vojaĝas somere, ĉar mia hobbio estas interalie la montara turismo. Ĉiujare ni duope, mi kaj mia edzo, veturas al montaro.

Mia biografio estas nun la biografio de geedzoj Parys. Ni estas samvojanaj, sed iufoje mi staras en la alia flanko de la vojo aŭ mi volas iri nenien... Nia vojo estas mallonga, tiujare ni festis la dekan datrevenon de nia geedziĝo. Mi edziniĝis ankaŭ printempe. Sed tiam estis bela vetero. La suno brilis kaj ni anoncis al la tuta mondo, ke ni estas feliĉaj.

# Akupunktura anestezo en Irano

**A**KUPUNKTURA anestezo por encefala operacio okazis senprecedente en la tehrana malsanulejo "Asija" en la 1-a de septembro 1988! La anesteziisto estas unu el ĉ. 30 iranaj akupunkturistoj. Li parolis kun ni pri sia sperto vaste ĉita en la gazetaro:

"Kvankam antaŭe mi kelkfoje aplikis akupunkturajn anestezojn al aliaj korpopartoj kaj organoj, kiel pulmo, strumo, hernio kaj stomako, tamen tio estas mia unua sperto feliĉe sukcesa apliki tiun anestezon al encefala operacio.

Antaŭ ol komenci anestezon al paciento, mi estis ege ekscitita kaj eĉ iom nervoza! Tiam ĉeestis ĵurnalistoj, fotistoj krom skeptikaj modernaj kuracistoj, kiuj nur atendis mian eventualan malsukceson kaj eble mian malgrandan fuŝeton por havi pretekston moketi min kaj la tutan akupunkturon. Ankaŭ inter miaj kolegoj troviĝas kompreneble multaj, kiuj taksas la metodon primitiva kaj senefika!

La anestezilon mi metis tute preta dum la operacio por eviti danĝeron de eventuala malsukceso! Feliĉe mi plene sukcesis. Nun mi estas preta ripeti tion por similaj operacioj encefalaj. Estas pli avantaĝe apliki akupunkturajn medikamentojn. Ni scias, ke anestezino havas grave malbonajn flank-efikojn sur anestezita malsanulo! Ekzistas malsanuloj, kiuj absolute ne kapablas toleri anestezinon. Por eviti perturbojn de la anestezino, por helpi operacian havi rapidan resaniĝon kaj por ri-


cevi ekonomian avantaĝon, akupunkturo estas senrivala.

En la priparolata kazo la operaciato, tute konscia dum la operacio, obeis niajn ordonojn, parolis, ridis kaj rigardis nin. Kaj post la operacio ŝi trankvile manĝis!

La paciento suferis pro benigna meninga tumoro. La ĥirurgo forprenis la 200-graman turoron dum 5-hora operacio.

Operacii encefalon havas sian propran malfacilaĵon. Krom troa hemoragio, kiu iom malhelpas facilan operacion, dum la operacio la meningo ŝveliĝas, se la operaciato ne estas bone anestezita! Koncerne al nia kazo, ni ne havis la menciitajn problemojn.

Por la anestezo mi uzis nur 8 pinglojn. Du el ili estis eltiritaj dum la operacio. Kelkajn el la akupunkturajn punktojn mi mem mal-



D-ro Sijavaŝ Ehsani, la akupunkturisto, kiu sukcesis fari anestezon en encefala operacio

kovris."

La kuracisto-akupunkturisto, d-ro Sijavaŝ Ehsani, estas ankaŭ moderna anesteziisto. Li elektis kurac-metodon akupunkturajn antaŭ dekelkaj jaroj. Li estas ankaŭ favora esperantisto kaj diris al ni pro tio: "Akupunkturo kaj Esperanto estas du samsortanoj senrivalaj. Ambaŭ facile atingeblaj kaj mirakle efikaj, sed samtempe ambaŭ neglektataj!" ■

## Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

# Sendrogaj terapioj de la ĉina medicino (III)

de ZHANG ZHAOYUN

**Ĉ**IGONG-O kiel sanig- kaj kuracmetodo estas ŝatata de pli kaj pli multaj homoj. La ĉina ĉigong-o havas multajn specojn kaj skolojn. Ĉigong-o stara, sida, kuŝa kaj ira apartenas al la kategorio de mova ĉigong-o. Oni ekzercas sin aŭ per en- kaj elspirado aŭ per ideodirektado aŭ per nenifara kvieto. Laŭ la karakterizaĵoj ĉigong-o dividiĝas en la molan kaj malmolan specojn. Ĝenerale dirite, la uŝu-a kaj akrobatika ĉigong-o estas malmola, dum la sanprotekta kaj vivlongiga ĉigong-o estas mola. Malgraŭ la diverseco de la skoloj, ĉiuj specoj de ĉigong-o portas trajton de la ĉina nacio, t.e. per sinrega ekzercado oni kulturas kaj plifortigas sian vitalan esencon. (Laŭ la ĉina medicino la homa vitala esenco formiĝas el energioj denaska kaj nedenaska de la akvo, manĝaĵoj kaj aero en kombino. Ĝi estas la bazo de la homa vivo.)

La ĉigong-terapio havas du specojn: Unu speco postulas, ke malsanuloj ekzercu sin per ĉigong-o por preventi kaj kuraci malsanojn, protekti kaj fortigi la korpon. La alia postulas, ke ĉigong-isto donu vitalan energion al malsanuloj por kuraci ilin. La du specoj, kvankam diferencaj, havas la saman celon.

Ĉigong-o estas sporto por kulturi vitalan energion kaj spiriton. Atinginte altan stadion de la ekzercado, la ĉigong-farantoj sentas la vitalan energion cirkulanta en ilia korpo laŭ ĝingluo-vojo. Tia energio nomiĝas interna vitala energio.

Spertaj ĉigong-istoj povas laŭvole direkti sian internan vitalan energion al siaj manoj aŭ aliaj korpopartoj kaj eksterigi ĝin. Sen tuŝi la korpon de malsanulo ĉigong-isto direktas la energion tra aero al lia ĝingluo-punkto aŭ malsana loko por kuraci lian malsanon. Tiu metodo ne kaŭzas pik- kaj bruldolo-

rojn kiel akupunkturo kaj mokso, nek amaron kiel tizano kaj efikas precipe por kuraci kronikajn malsanojn.

La ekstera vitala energio estas nevidebla, nek kaptebla. Ĝi tamen povas kaŭzi al homa korpo formikadon, varmon, pezon, malvarmon aŭ pikdoloron. Se ĉigong-isto direktas sian vitalan energion al la tuta korpo de malsanulo, tiam la kvar membroj de la malsanulo tremas pretervole aŭ saltas forte, kaj lia kapo aŭ korpo ŝanceliĝas ritme.

Kiel la ekstera vitala energio povas kuraci malsanojn? Laŭ la ĉina medicino ĝingluo estas vojo de la vitala energio kaj sango de homo kaj ĝi devas esti ĉiam facile trairebla. La vitala energio de ĉigong-o povas vigligi ĝingluovojon kaj reguligi la cirkuladon de la vitala energio kaj sango. Atinginte la malsanulon, la ekstera vitala energio iras al la malsana loko

Li kuracas malsanulinon per ĉigong-terapio.

Eksterlandano kuracata per ĉigong-terapio





laŭ ĝingluo-vojo kaj poste, pere de regulado de informoj, retroinfluas la cerbon kaj vigligas la reguligan sistemon de la homa korpo por mem ludi kuracŝan rolon. Ricevinte la eksteran vitalan energion, multaj malsanuloj sentas, ke ĉe ili la vitala energio kaj sango pli bone cirkulas, ili pli vigliĝas, ekhavas pli bonan apetiton kaj pli profunde dormas. Tion kaŭzas la vitala energio. Laŭ la ĉina medicino, la vitala energio komandas la sangon; se la vitala energio kaj sango stagnas, malsano estiĝas; se glate cirkulas la vitala energio kaj sango, neniu malsano atakas. Cirkulante en la homa korpo, la vitala energio povas masaĝi la internaĵojn, forigi la internajn obstaklojn, glatigi ĝingluo-vojon kaj reguligi la fiziologian funkcion.

La Ŝanhaja Hipertensia Instituto kuracas hipertension per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino jam de la 50-aj jaroj. La kuracistoj de la instituto sisteme observis 135 malsanulojn de du grupoj. Oni kuracis unu grupon per malmulte da hipotensiigilo kaj samtempe per ĉigong-o kaj la alian grupon nur per medikamentoj. Rezulte, 86.6-95.6% de la malsanuloj en la unua grupo akiris kurac-efikon, dum nur 70.7-76.7% de la malsanuloj en la dua grupo akiris kurac-efikon. Ĉigong-o kuracas ne nur hipertension, sed ankaŭ kardiovaskulajn malsanojn, stomakan ulceron, neŭrozon kaj aliajn kronikajn malsanojn kaj maljunulajn malsanojn.

Ĉar homoj havas malsamajn sentemojn al la vitala energio, tial ĉigong-o ne donas saman kurac-efikon al malsanuloj. Oni dividas la sentemojn ĝenerale en klaran, meze klaran kaj malklaran.

La sendrogaj terapioj de la ĉina medicino ampleksas ankaŭ tajĝiĉjŭan, ok sanigajn ekzercojn, uŝu-on kaj aliajn sportajn kaj muzikajn terapiojn. Oni kuracas malsanojn ankaŭ per sunlumo, termofonto, arbaro kaj neĝo, pri kio mi ne traktos ĉi tie. ■

QING FU:

# Sekuriga protekto de ĉinaj civilaj nukleaj ekipaĵoj

**N**EMALMULTE da homoj sentas timon pri ekspluatado de nuklea energio, eĉ pri ĝia paca utiligo, kia konstruo de nuklea elektrostacio, ĉar la eventuala polucio de radioaktivaĵoj kaŭzas grandan damaĝon pro nebona sekuriga protekto. Tamen la alta takso pri la sekuriga protekto de nukleaj ekipaĵoj povas preventi la akcidenton.

La nuklea industrio de Ĉinio jam aĝas pli ol 30 jarojn. Stariĝis kompare kompleta sistemo de nukle-fuzaĵa cirkulo, inkl. de geologia prospektorado, ercekspluatado, prilaboro de maŝinpecoj kaj postuza traktado. Ĉinio jam prospektoris kaj trovis certan rezervokvanton de uranio, konstruis plurspecajn nukleajn reaktorojn kaj akcelilojn. Nun la industrio daŭre disvolviĝas. La Pekina Poziton-negatona Kolizilo finkonstruiĝis kaj sukcese interkoli-ziigis pozitonojn kaj negatonojn. Estas konstruataj la memprojektitaj Qinshan-a Nuklea Elektrostacio kaj Dayawan-a Nuklea Elektrostacio kune investita de Ĉinio kaj Hongkong.


La ĉina registaro turnas altan atenton al la sekuriga protekto de nuklea ekipaĵo. En oktobro de 1984 Ĉinio fondis la Ŝtatan Buroon de Nuklea Sekuriga Protekto, kiu funkcias kiel la ŝtata institucio por ekzameni kaj inspekti nuklean sek-

urigan protekton de civilaj nukleaj ekipaĵoj laŭ la leĝoj de la ŝtato. Ĝi ankaŭ respondecas pri esplorado, ellaboro kaj perfektigo de kodoj pri nuklea sekuriga protekto.

La 7-an de julio, 1986, post la sankcio de la Ŝtata Konsilantaro la Ŝtata Buroo de Nuklea Sekuriga Protekto publikigis kvar porsekurajn regulojn pri elekto de ejo, projekto, funkciigo kaj kvalita garantio de nuklea elektrostacio. Kaj estas ellaborataj la porsekuraj kodoj pri nukleaj ekipaĵoj kaj materialoj, protekto kontraŭ nuklea radiado, transportado de radioaktivaj materialoj, kaj ankaŭ detalaj artikoloj sub ili.

La konstruata Qinshan-a Nuklea Elektrostacio situas en Haiyan-gubernio, Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco, 120 km. sude de Ŝanhajo. La Dayawan-a Nuklea Elektrostacio situas ĉe la golfo Dayawan, oriente de la buŝo de Perlo-rivero en Guangdong-provinco, 45 km. for de Shenzhen kaj 50 km. for de Hongkong. Post la finkonstruo ili multe akcelos la ekonomian disvolviĝon de suda Ĉinio, kie mankas energioj.

La konstruo de tiuj nukleaj ekipaĵoj sendube vekis grandan atenton de la ĉina popolo, precipe de la loĝantoj vivantaj apud tiuj konstruaĵoj. Ili timegis la eventualan akcidenton. La respondeculoj kaj



La Qinshan-a Nuklea Elektrostacio en konstruado

specialistoj de la koncernaj departementoj de la registaro konigis la loĝantojn pri scioj de nuklea energio, prezentis iliajn konsiderojn pri sekuriga protekto kaj porsekurajn rimedojn en elektado de ejo, konstruado kaj muntado de diversaj ekipaĵoj kaj tiamaniere neniigis la timon kaj skrupulon de grandparto de la loĝantoj.

Nuklea elektrostacio estas destinita por ŝanĝi la nuklean energion ellasitan dum fisio en elektran energion. Ĝia kerno estas reaktoro, kie la nuklea energio ŝanĝiĝas en termoenergion. Koncernaj specialistoj diris, ke por preventi la eventualan tralikiĝon de radioaktiva materialo kaj ne damaĝi vivmedion per polucio tiuj nukleaj elektrostacioj havas tri protektaĵojn: la fuzaĵoj kolonet-formaj el urania dioksido estu hermetike fermitaj en cilindroj el zirkonia alojo. Se difektiĝas la cilindro, la radioaktiva materialo tralikiĝas nur en akvon hermetike en la dua protektaĵo, kiu estas 200 mm. dika premŝelo. La tria protektaĵo nomiĝas porsekura ŝtal-betona ŝelo, kiu estas kolonego kun glob-forma supro. Ĝi kun 37-metra interna diametro estas 60 m. alta kaj unu metron dika. Ĝi estas armita per 6

mm. dika ŝtalplato sur sia interna surfaco. La ŝelo, tute ne tralasebla, povas elteni altajn internan premon, temperaturon en eventuala akcidento, naturajn katastrofojn, kiaj trombo, tertremo, kaj frapadon de eksteraj flugaĵoj. Dum la projektado kaj konstruado oni multe konsideris pri la absoluta sekureco de la stacio.

Ankaŭ la traktado de ellasitaj gaso, akvo kaj skorio de la nuklea elektrostacio estas grava. La principo de Ĉinio pri tiu traktado estas laŭeble rekolekti kaj minimume ellasi. Oni devas rigore observi la koncernan regularon de la ŝtato, kaj ellasaĵoj radioaktivaj estu multe malpli altaj ol la permesita normo. La postuzaj fuzaĵoj de la elektrostacio antaŭ ĉio estas enmetitaj en skorian akvobasenon duonjaron por transmuto kaj malvarmiĝo. Post tio oni transportas ilin en plumba ujo al pritrakta fabriko por koncentra traktado.

Ĉinio jam akiris praktikajn spertojn en traktado de postuzaj fuzaĵoj de reaktoro. Post 20-jara irado de la unua ĉina pezakva reaktoro oni anstataŭigis ĝiajn malnovajn fuzaĵojn per la novaj en 1982 kaj faris konvenan traktadon al la malnovaj fuzaĵoj. Nun la reaktoro iras normale kaj produktas radioaktivajn izotopojn.

Nun en la lando laboras diversaj medicinaj akceliloj, regataj de specialistoj kaj perfekte protektataj. La altenergiaj akceliloj perfekte protektataj laboras absolute sekure. La Pekina Poziton-negatona Koliziilo laboras laŭ rigora postulo, ke ĉiuj ĝiaj partoj kaj sistemoj normale, stabile kaj kontinue laboru pli ol centojn da horoj, post kiam la koliziilo ekfunkciis, ĉar alie ĝi ne povas kontentigi la bezonojn de la fizikaj eksperimentoj. Tial ĉiuj sistemoj kaj partoj de la maŝinaroj devas labori sekure, fidinde, ne malhelpante la normalan funkcion de aliaj sistemoj kaj kaŭzante neniun malutilon al iliaj manipulantoj.

La ĉefaj partoj de la Pekina

Poziton-negatona Koliziilo estas metitaj en tunelo 6 m. profunda sub la tero. La dikaj betona tegmento kaj tero super ĝi bone ŝirmas kontraŭ radiado estigita de la maŝinoj. Sur la tero oni apenaŭ povas trovi per radimetro radiojn. En la tunelo kaj la ronda halo de stor-ringo estas dispoziciitaj 23 radiometroj por kontroli ĉiutempe la densecon de neŭtonoj kaj gama-radioj. Ĉe la ekfunkcio de la maŝinaroj estas malpermesate por ĉiuj eniri en la halon kaj tunelon pro tio ke tie ekzistas sufiĉe granda radiado. Oni muntis kuplajn ŝaltilojn ĉe la enirejoj de la halo kaj tunelo. Se la pordoj de tiuj enirejoj ne estas ŝlositaj, do la maŝinaroj ne estas funkciigeblaj. La eventuala misentrudiĝo alarmigas kuplajn ŝaltilojn, kiuj aŭtomate malkonektas elektran cirkviton de la poziton-negatona koliziilo por ke la misentrudiĝinto ne estu damaĝita de radiado. Estas permesite eniri nur post certa tempo post la halto de la maŝinoj, kiam la restantaj radioaktivaĵoj estas sufiĉe transmutiintaj.

Ĉiuj laborantoj en la halo kaj tunelo havas sur si apartan broĉon, nomatan persona radio-indikilo, sur kiu estas algluita peco da litia fluorido. Ĝi povas indiki akumulitan dozon de radiado de la broĉoportanto. La sciencistoj kaj teknikistoj tie laborantaj akceptas mezuradon de dozo post ĉiuj tri monatoj. Ĝis nun oni ne trovis laborantojn, kiuj ricevis pli da dozo ol tiu permesita de la ŝtato, ĝenerale ili ricevis apenaŭ kvinonon da dozo permesita de la ŝtato.

Por sekurigi la vivmedion, en la korto de la labor-regiono de la Pekina Poziton-negatona Koliziilo troviĝas tri vivmediaj kontrolpunktoj. Laborantoj faras periodan radio-mezuradon. Ĉiuj praktikaj registroj faritaj ekde la prov-laboro de la Pekina Poziton-negatona Koliziilo montras, ke la radio-polucio al la vivmedio estas malpli granda ol la normo difinita de la ŝtato. ■

● Ĝis la pasinta novembro la totala produktovaloro de la ĉina industrio superis 1 000 miliardojn da juanoj, je 17.7 procentoj pli multe ol en 1987.

● Plia Malvarma Laminejo de Ĉinio — la Malvarma Laminejo sub la Baoshan-a Ŝtala Kompanio en Ŝanhajo estas finkonstruita kaj komencis provan produktadon. La ĉefaj ekipaĵoj de la laminejo estas importitaj el Federa Germanio. La jara produktokvanto estos 2.1 milionoj da tunoj da ŝtalaj lamejoj.

● En Pingwei de Anhui-provinco, la plej granda generatoro de Ĉinio kun kapacito de 600 000 kW komencis produkti elektron en la 15-a de la lasta decembro. Tio markis, ke Ĉinio fariĝis unu el landoj kapablaj produkti tian generatoron.

● En la lastaj dek jaroj kvarobligis la produktovaloron de la nutraĵa industrio, okupante la trian lokon en la nacia ekonomio.

● Post dekjara peniga laboro la dutraka fervojo inter Hengyang kaj Kantono estas komplete konstruita. La linio longas 529.37 km. La dutraka tunelo Dayaoshan 14.29-kilometra estas la plej longa

tunelo en Ĉinio.

● Ĉinio elfaris sian unuan superleĝeran aeroplanon kun pezo de malpli ol 150 kg. Ĝi estas dispartigebla.

● La plej freŝdata statistiko montras, ke 6 000 mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj praktikas akciismon.

● En 1988 Ĉinio multigis je 23 procentoj la eksportan kvanton de karbo kompare kun 1987, kvankam kreskis enlanda bezono kaj okazis naturaj katastrofoj.

● En la urbo Lanzhou (Langōu) de Gansu-provinco konstruiĝis la ĉina plej granda pezjona akcelilo vaste utiligebla en nuklea, molekula kaj solid-stata fizikoj. La akcelilo servas ankaŭ al eksterlandaj fakuloj, precipe al la triamondaj sciencistoj en esplorado de pezjona fiziko.

● Ĉinio havas pli ol 190 ĉemarajn havenurbojn kaj la ĉefaj el ili estas mekanizitaj. Ĉinio posedas oceanan floton de 12 milionoj da toneloj.

● Nun en Ĉinio estas 11 000 entreprenoj investitaj de ĉina-alilanda kapitalo aŭ de sole alilanda kapitalo. Investintoj el Hongkongo kaj Aomen plej multe investis, kaj post ili la usonanoj.

● Ĉinio posedas gigantan tajdan energion, kaj 21 milionoj da kW estas ekspluateblaj. Nun en la Tajda Elektrejo Jiangxia (Ĝjangŝja) de Zhejiang-provinco (Ĝĝjang), la tria granda en la mondo, 5 generatoroj respektive kun kapacito de 3 200 kW estas muntitaj.

● La lasta generatoro de la plej granda hidroelektrejo Gezhouba (Geĝoŭba) de Ĉinio komencis liveri elektron. Ĝis nun ĉiuj 21 generatoroj de la hidroelektrejo, kun totala kapacito de 2.715 milionoj da kW estas finkonstruitaj.

● Ĉinio finkonstruis en sia Hainan-provinco lanĉejon de raketoj por scienca esplorado. Baldaŭ tie oni faros provan lanĉon de raketo.

● La kosmonaŭtika telesensa tekniko de Ĉinio atingis mondan nivelon. En loko centojn da kilometroj super la tero, la telesensa aparato sur sputniko povas foti diversajn objektojn sur la tero.

● La Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio proklamis en la 20-a de la lasta novembro, ke Ĉinio agnoskas la ŝtaton Palestino.


● Ĉinio enloĝigis 280 000 transfuĝintojn el Hindoĉinio, la nombro estas malpli granda nur ol tiu de Usono kiu enloĝigis 290 000.

● Ĝis la pasinta novembro, la totala sumo de kontraktitaj limregionaj negocoj de la provinco Heilongjiang (Hejlongĝjang) kun Sovetunio superis 480 milionojn da svisaj frankoj, el kiuj la sumo de plenumitaj importoj kaj eksportoj atingis 130 milionojn da svisaj frankoj, egale al la totala sumo en kvin jaroj antaŭ 1983, en kiu la limregiona komerco estis restarigita.

● Ekde praktiko de la politiko malfermi pordojn al la eksterlando, la ĉina dogano alprenis serion da privilegiaj politikoj. En la naŭ jaroj antaŭ la pasinta septembro la ĉina dogano malaltigis doganpagon je 20 miliardoj da juanoj.

● Dum la okjara kunlaboro de Ĉinio kaj la Monda Banko, Ĉinio

En la Malvarma Laminejo sub la Baoshan-a Ŝtala Kompanio de Ŝanhajo



ricevis krediton je 7.2 miliardoj da usonaj dolaroj.

● En la venontaj ses jaroj de 1989 ĝis 1994, en Ĉinio estos ĉ. cent milionoj da virinoj troviĝantaj en nas-

kema periodo (20–29-jara). Pro tio avertis la Ŝtata Komisiono pri Naskolimigo, ke oni devas doni ekstreman atenton al naskolimiga laboro.

● En la Dua Monda Ĉampionea Konkurso de Virina Halterlevo en Ĝakarto ĉinaj sportistinoj rompis 7 mondajn rekordojn kaj gajnis 12 orajn medalojn.

● En la tritaga ĉampionea konkurso okazigita de la Federacio de la Gimnastikaj Asocioj de Pacifikaj Landoj de 1988 ĉinaj sportistoj gajnis la ĉampioneojn kaj duajn lokojn de la vira kaj virina grupaj konkursoj kaj vira kaj virina individuaj kunmetitaj konkursoj.

● Ĉinaj sportistoj gajnis 8 orajn, 4 arĝentajn kaj 9 kuprajn medalojn en la Oka Monda Ĉampionea Konkurso de Arta Gimnastiko.

● Observatorio Zijinshan en Nankino sub la Ĉina Akademio de Sciencoj lastatempe trovis novan kometon. La Internacia Centro de Malgranda Planedo kaj Kometo konfirmis la trovon. La nova trovo havas gravan signifon por esploro de orbita evoluo kaj fizikaj ecoj de kometoj.

● Ĉinaj arkeologoj lastatempe trovis homajn fosiliojn en la vi-


laĝo Longping de Wushan-gubernio, Sichuan-provinco. Post analizo la ekspertoj konstatis ke la apero de homoj devas esti je 300 000 jaroj antaŭ Yuanmou-homoj aperintaj antaŭ 1 700 000 jaroj.

● La Akademio de Preventa Medicino de Ĉinio elfaris du specojn da proviloj, per kiuj oni diagnozis 8 kazojn de infektitoj de AIDS-malsano.

● Ĉe la limo inter la provincoj Hunan, Guangdong kaj Jiangxi (Ĝjangŝji) oni trovis mirindan galerion el dekoj da kavernoj. Ĉie en la kavernoj oni povas vidi groteskajn rokojn. Sur la muro en la galerio ankoraŭ restas kaligrafiaĵoj de Ming-dinastio (1368–1644).

● Antaŭ nelonge porcelana bovlo kun koloraj desegnaĵoj de Qing-dinastio (1644–1911) estis aŭkciita en Hongkongo je 7.92 milionoj da HK-dolaroj. Tio estas la rekorda prezo de porcelanaĵoj de Qing-dinastio.

● En la 80-aj jaroj ĉinaj filmoj gajnis 174 premiojn en internaciaj filmaj festivaloj, sed enlande filmorigardantoj akre reduktiĝas je miliardo da homfojoj ĉiujare, kaj multaj filmstudioj frontas financan malfacilon.



La tensialtiga transformatorejo de la Elektrejo de Pingwei, Anhui-provinco



Tunelo Dayaoshan de la dutraka fervojo inter Hengyang kaj Kantono

# Infanĝardeno plene konfidinda

**F**ARIĜONTE patro, mi ekvolis viziti infanĝardenon. Mi vizitis antaŭ nelonge la infanĝardenon de la 3-a Pekina Tekstila Fabriko, kiu sidas en la orienta antaŭurbo de Pekino. Suferinte interpuŝigon du horojn en aŭtobuso, mi iom laciĝis, kiam mi atingis la lokon. Enirinte en la infanĝardenon, mi vidis, ke aroj da infanoj dancas kaj kantas mano en mano. Vidinte min, ili salutis min unuvoĉe: "Bonan matenon, oĉjo!" Antaŭ tiuj infanoj amindaj kaj sanaj, mia laco tuj forlasis min.

S-ino Xu, la estrino de la infanĝardeno, akceptis min. Ŝi konigis al mi, ke la infanĝardeno fondiĝis en 1957 kaj ĝis nun tie lernis 8000 infanoj. Nun, tie vivas pli ol 700 infanoj, plejparto el ili estas solinfanoj. Gepatroj doriotas ilin kaj deziras, ke la infanĝardeno zorgeme flegu kaj eduku ilin. La infanĝardeno havas pli ol 120 labor-

antojn, sed malmultaj el ili diplomitiĝis el la pedagogia lernejo.

Tie mi ĉeestis belartan lecionon. Instruistino Liu Li prezentis al la infanoj pentraĵon, sur kiu kelkaj leporoj petolas, tigro post arbo avide rigardas la leporojn, elefanto sin banas en rivereto. Instruistino Liu diris al la infanoj, ke la titolo de la pentraĵo estas "Elefanto savas leporojn". Ŝi petis de la infanoj montri kiel la elefanto povas savi la leporojn, kaj poste fari desegnon laŭ sia pripenso. La geknaboj konkure esprimis sian opinion. Iu diris, ke la elefanto transportis la leporojn unu post alia per la rostro al la alia bordo. Alia diris, ke la elefanto forpelis la tigron. Tria diris, ke la elefanto staranta meze de la rivero faris ponton per siaj rostro, korpŝ kaj vosto, por ke la leporoj kuru unu post alia sur la ponto al alia bordo. Videble, ke la leciono multe interesis la infanojn. S-ino

Xu eksplikis al mi, ke la infanoj bezonas imitan instruadon, sed la plej grava estas aranĝi la intereson, ludon kaj sugeston en unu harmonian tuton. Laŭ tiu metodo ili instruas al la infanoj matematikon kaj ĉinajn ideografiaĵojn.

En la mezgrada klaso mi vidis, ke aro da infanoj faras dometojn, parketojn kaj aliajn konstruaĵojn el lignokubetoj. Du infanoj kvarelis pro unu lignokubeto. Tiam la instruistino diris al ili, ke oni devas modeste cedi unu al la alia kaj amikiĝi. Do la du infanoj obeis. La instruistino diris al mi, ke ili volas en rakontoj kaj ludadoj kulturigi al la infanoj bonan konduton kaj noblan spiriton.


Nun multaj gepatroj volas, ke iliaj infanoj lernu muzikan instrumenton kaj arton. La infanĝardeno funkciigas por la geknaboj kursojn de violono, elektrona muziki-

Sur ludkampo



Porti infanon al la infanĝardeno matene





Trejni infanojn en dancado

lo, akordiono, danco kaj pentrado. Iuj geknaboj estis premiitaj en urba kaj distrikta konkursoj.

Enirinte en la ĉambron de la supera klaso, mi vidis, ke la in-

En lernado de pentrado



Mi rakontu al vi rakonton.

fanoj dancas akompanate de piano, kiun lerte ludas 35-jara instruistino. S-ino Xu diris, ke ŝi nomiĝas Bian Xiaowu kaj laboris jam dekelkajn jarojn en la infanĝardeno. Mi pensis, ke ŝi certe diplomitiĝis el pedagogia lernejo, sed Xu skuis la kapon: "Ŝi lernis nur en mallonga kurso." Ŝi daŭrigis: "La instruistoj estas ŝlosilo por sukcese funkciigi la infanĝardenojn. Nun la malmultaj diplomitoj el pedagogiaj lernejoj ne povas kontentigi la

bezonojn de la socio, tion ni mem devas solvi. Ni jam sendis dekojn da instruistinoj en trejnajn kursojn de aliaj lokoj. Ĉiuj ĉefinstruistinoj estis trejnitaj pli ol 6 monatojn. Kaj plie ni akiris iujn sukcesojn per jenaj metodoj: sendi elstarajn instruistinojn en altajn lernejojn, peti fakulojn doni al ni lecionojn, organizi junajn instruistinojn en lernado de la veteranaj, ofte ekzameni instruistinojn k.a."

Plejparto de la instruistinoj de la infanĝardeno estas patrinoj. Ili traktas la geknabojn de la infanĝardeno kiel siajn proprajn infanojn. Multaj infanoj nomas sian instruistinojn panjo. Foje, iu instruistino forestis pro malsano kelkajn tagojn, la geknaboj demandis ĉiutage ĉu ŝi resaniĝis aŭ ne kaj petis siajn gepatrojn konduki ilin viziti ŝin. Kiam la instruistino resaniĝis kaj revenis al la infanĝardeno, la infanoj ŝin ĉirkaŭis kaj demandis ŝin jen pri tio jen pri alio, de kio ŝi emociiĝis ĝis larmoj.

Tiutage, kiam la geknaboj prenis tagmanĝon, mi vizitis kelkajn klasojn. Ĉiuj infanoj havis du pladojn vegetalan kaj viandan kaj krome bovlon da supo. S-ino Xu diris, ke por ke la infanoj bone manĝu kaj sane kresku, la aĉetisto devas klopodi multe por aĉeti fiŝojn, legomojn, viandon, ovojn kaj fruktojn. La kuiristoj preparas div-

ersajn manĝaĵojn por ili. Kompreneble krom manĝaĵoj ankaŭ la sanprotektado kaj sporto estas gravaj. La infanĝardeno donas grandan atenton al pureco de la kuirrejo, klasĉambro, dormoĉambro, necesejo, kaj samtempe alkitimigas la infanojn al pureco. La geknaboj ĉiutage ludas 2 horojn eksterdome kaj ĉiujare havas 2 sportkunvenojn. Nun la infanoj bone fartas. Iliaj sangpigmento, korpo-

pezo kaj alto superis la mezan nivelon de tiu de la infanoj en Pekino.

En tiu ĉi fabriko funkcias 3-skipa laboro, kaj plie tie ofte estas sturma laboro aŭ portempa teknika ekzercado. Por faciligi la laboristojn, la infanĝardeno faras eksteran laboron kaj senpage flegas la infanojn. Mi demandis al iu laboristino: "Ĉu vi estas trankvila kon-

fidi vian infanon al la infanĝardeno?" Ŝi respondis: "La instruistinoj traktas la infanojn kiel siajn proprajn, kaj mi havas plenan konfidon al ili."

Je la fino de mia vizito, s-ino Xu diris al mi: "Estos bone, se ankaŭ via infano flegiĝos ĉe ni." Mi dankis ŝin pro la afableco, sed mi bedaŭras, ĉar mi loĝas malproksime de la infanĝardeno. ■

Gaja danco



# Elafuroj revenintaj al la hejmloko

**E**N la suda antaŭurbo de Pekino troviĝas vasta marĉo, kie kreskas fragmitoj kaj salikoj. Sur la herbejoj paŝtiĝas kaj petolas elafuroj aro post aro. La loko estas la Nanhaizi-a Elafura Ĝardeno.

La elafuroj origine estis raraj bestoj vivantaj nur en Ĉinio. Bedaŭrinde, ili malaperis en Ĉinio en militaj jaroj kaj estis enkondukitaj en aliajn lokojn de la mondo.

En 1865 franca misiisto David vidis en la imperia ĉasejo Nanyuan de Pekino beston, kiun li vidis neniam antaŭe. Ĝi havis du kornojn similajn al tiuj de cervo, nukon al tiu de kamelo, hufojn al tiuj de bovo kaj voston al tiu de azeno. Li akiris felon kaj kranion de tia besto kaj petis parizan zoologon ilin ekspertizi. Sekve de tio, ĝi estis difinita kiel nova specio de cervedoj kaj ricevis la nomon elafuro (*Elaphurus davidianus*). De tiam la elafuroj estas alte taksataj. Dekoj da elafuroj estis forportitaj el la ĉasejo kaj vivis en Francio, Germanio, Nederlando kaj Belgio. La

11-a-generacia duko Bedford de Britio estis amanto kaj protektanto de cervedoj. En 1894 li aĉetis en Parizo paron da elafuroj, poste aliajn 18 kaj bredis ilin en sia vilao. Ĉ. 1 500 elafuroj nun vivantaj en la vilao kaj aliaj lokoj de la mondo estas idoj de la elafuroj tiam breditaj de duko Bedford.

En la lastaj jaroj de Qingdinstio (1644-1911), la lastaj 200-300 elafuroj bredataj en la ĉasejo suferis inundon de la rivero Yongding en 1894 kaj prirabon de la invadanta Ok-potenca Alianca Armeo de Britio, Francio k.a. en 1900. Sekve de tio, la ĉinaj elafuroj malaperis en sia hejmloko.

Dum la Unua Mondmilito duono de la elafuroj breditaj de la familio Bedford mortis de malsanoj kaj malsato. La heredantoj de la duko Bedford konis, ke por gardi la elafurojn de pereco, oni devas dissendi ilin al aliaj partoj de la mondo. De 1944, elafuroj estis enkondukitaj en pli ol 20 landojn.

La familio Bedford de longe havis la deziron, ke elafuroj denove vivu en sia hejmloko. La Londona Zoologia Instituto en 1965 kaj 1973 donis al la Pekina Zoo 4 parojn da elafuroj. La unuaj du paroj mortis de malfavora medio kaj la postaj du paroj ne naskis idojn.

En 1985, markizo Tavistock, pranepo de duko Bedford, speciale vizitis Pekinon kaj donacis 5 masklajn kaj 15 femalajn elafurojn al la Nanhaizi-a Elafura Ĝardeno. Kaj en 1987 Ĉinio refoje enkondukis aron da elafuroj el Britio.

Estas malofte vidite, ke oni revenigis besto-specion al la loko, kie ĝi vivis antaŭe, por savi ĝin de pereco. Tio havas gravan signifon en protektado de elafuroj kaj fortiĝo de la amikeco inter la ĉina kaj brita popoloj. Laŭ interkonsento farita de Ĉinio kaj Britio fondiĝis unuiga grupo de fakuloj pri reenkonduko de elafuroj kaj eksperimenta centro de elafura ekologio. Ĉinaj kaj britaj fakuloj esploris pri la historio, nutrado, fekundigado, parazitoj, malsanoj de elafuro kaj ĝia prizorgado kaj akiris certan sukceson.

Elafuroj ŝatas akvon kaj povas elteni froston. Vintre ili ofte petolas en malprofunda akvo kaj marĉo, kaj eĉ kuŝas en kota akvo aŭ kuras sur glaciiginta lago. Kiam blovas forte norda vento kaj glaciigis la tero, ili dormas sub la ĉielo sentime. Ili vivas bone en la favora medio de Nanhaizi. La 15 femalaj elafuroj, kiuj revenis en sian hejmlokon en 1985, naskis 10 idojn vivajn en la unua fekundiga periodo. Nun la gregoj breditaj en la ĝardeno konsistas jam el 53 elafuroj.

En la Elafura Ĝardeno de Nanhaizi





# Papilioj

Teksto de LAN SHAN

Fotoj de HUA ZHONGMING

**L**A papilioj estas insektoj manĝantaj vegetaĵojn. Kvankam ili damaĝas grenplantojn, legomojn kaj fruktarbojn, tamen ili estas ŝatataj de homoj pro siaj svelta korpo, belaj flugiloj kaj facilaj movoj.

En la mondo estas pli ol 14 000 specoj de papilioj, el kiuj ĉ. 1 300 specoj vivas ankaŭ en Ĉinio, i.a. nemalmultaj estas propraj al Ĉinio.


Plej belaj estas la diversspecaj papilionoj el la papilioj. La du paroj da flugiloj surhavas belajn buntajn makulojn, kiuj trembrilas en sunradioj. Ili havas longajn vostaĵajn pintojn de postaj flugiloj kaj flirtas kiel feinoj en dancado. Jadbendaj papilionoj (*Papilio polytes*) havas nigrajn korpon kaj flugilojn kun 7 blankaj makuletoj ĉe la ekstera rando de antaŭaj flugiloj, 7 flav-blankaj makuletoj meze de postaj flugiloj, 6 flav-blankaj novlunaj makuletoj ĉe la dorsflanko kaj unu ruĝa duoncirkla makuleto ĉe la posta angulo de postaj flugiloj. Ili ofte flirtas inter floroj. Kiel monde rara speco, la ormakula libiteo havas triangulajn antaŭajn flugilojn kaj troveblas nur en la montregionoj de la nordokcidenta Fujian-provinco kaj norda Guangdong-provinco de Ĉinio. En nia lando vivas malgranda papiliono, kies etenditaj flugiloj larĝas nur 28 milimetrojn. Ĝi havas hirundvostaĵajn pintojn ĉe la postaj flugiloj. Kiam ĝi suĉas flormielon, ĝi tenas sian korpon longe en aero, pere de rapida balancado de la flugiloj kaj vostaĵaj pintoj. En mon-

treĝonaj bambuaroj de la okcidenta Sichuan-provinco troviĝas Emei-stikoftalmo (*Stichophthalma howgua*), kies etenditaj flugiloj larĝas 100-120 milimetrojn. En la montregiono de Shaanxi-provinco vivas ora papiliono (*Troides aea-cus*). La etenditaj flugiloj de femala ora papiliono larĝas 145 milimetrojn. Ili estas raraj grandaj papilioj.

Taiwan-provinco, kiu situas en la tropika kaj subtropika zono, havas pli ol 380 specojn de papilioj kaj estas honorita kiel lando de papilioj. Tie ofte videblas kalimoj (*Kallima chinensis*), longvostaĵaj papilionoj kaj grizaj papilietoj (*Zizira otis*), kiuj estas rigardataj kiel raraj papilioj. Taiwan estas konata loko riĉa je diversspecaj kaj multnombraj papilioj. Tie kreskas grandaree orangarboj kaj pampelmusarboj ŝatataj de papilioj kaj regas varma klimato. Ĉiujare la papilioj tie povas generi 4-5 fojojn. En iuj valoj flirtas papilioj tutjare inter floroj kaj herboj, kio faris la naturon pli bela. Tial oni nomas ilin papiliaj valoj. Nun en Taiwan estas trovitaj pli ol 10 tiaj valoj.


Papilioj povas vivi ankaŭ en malvarma zono. La koliadoj (*Colias hyale*) vivas sur la Tibeta Altebenajo 4 000 metrojn super la marnivelo. Ili havas hel-flavajn flugilojn kun nigra rando, flugas rapide kaj estas malmultaj kaj malfacile kapteblaj, tial ili estas unu el la raraj specoj de papilioj en nia lando.

Iuj papilioj povas flugi milojn






da kilometroj. Ifoje kolektiĝas miliardoj da papilioj. Papilioj ŝatas resti en la loko kun aromaj floroj kaj herboj. 40 kilometrojn norde de la urbo Dali de Yunnan-provinco, Ĉinio, kuŝas la Papilia Lageto, turisma loko monde fama.

La mistera Papilia Lageto sin trovas proksime de Erhai-lago kaj



ĉe la piedo de Cangshan-monto. Tie dense kreskas antikvaj arboj. Apud la klara lageto staras dika akacio, kies frondaro kaj trunko etendiĝas super la lageto. Ĉiujare en la pariĝa kaj ovoellasa tempo de papilioj je printempa fino kaj somera komenco, ĉe la lageto aromas diversaj floroj kaj kolektiĝas sennombraj papilioj. Ili flirtas sub arbo kaj inter floroj. Precipe mirigas la natura spektaklo: Sennombraj papilioj buŝe entenas voston unu de alia kaj interligas sin en grapolojn, kiuj pendas de la arbo ĝis la lageta surfaco. La buntaj rubandoj de papiliaj grapoloj longaj je kelkaj metroj skuigiĝas en vento kaj ne disiĝas batate de ŝtonoj. La lokaj banoj nomas papilia festo la 15-an de la kvara monato laŭ la luna kalendaro, kiam tie kolektiĝas plej multaj papilioj. ■





# Ĉinio en okuloj de germano

**I**RI al Ĉinio kaj resti tie unu jaron aŭ pli longe ja estas neordinare por germano eĉ hodiaŭ, kiam Ĉinio malfermiĝas al la ekstera mondo. Kiam mi anoncis al miaj kolegoj kaj konatoj mian vojaĝoplanon, iuj el ili admiris, aliaj enviis kaj triaj revis tion. Unuvoĉa respondo: Bonege!

En la Federa Germanio ekzistas multaj gurditaj antaŭjuĝoj pri la Ĉina Popola Respubliko. La antaŭjuĝoj radikas el du bildoj. En unu bildo, Ĉinio restas lando de imperiestro kaj mandarenoj. Tie estas bele ornamitaj ĝardenoj, romantikaj pontetoj kaj te-trinkejoj, dece vestitaj riĉaj registoj, fraŭlinoj en silka robo kaj kun facilaj paŝoj, meditemaj budaistoj kaj sa-

ĝuloj kun longa blanka barbo. Tiu romantika beligo devenas de admiro al antikva kulturo kaj laŭdo pri eleganteco, riĉeco kaj kvieteco de la jam neekzistanta supera klaso.

Kontraste kun tiu nebula bildo pri la jam forpasinta aŭ eble neniam ekzistanta Ĉinio, prezentiga la alia bildo, en kiu Ĉinio estas lando de kultura revolucio. Tie estas nenia alia kostumo, krom bluj uniformoj kaj okangulaj kaskedoj kun ruĝa stelo. Tie la rolo de individuo estas bagatela. Ĉiuj diligente sin okupas pri laboro, kiu al individuo nenion alportas, sed al la publiko multon. Tie oni manĝas rizaĵon en somero kaj brasikon en vintro. Tie komunismo senkompate regas ĉion. Malbonuloj estas

en edukejo, kie ili estas punataj per perforta laboro. La supre menciitaj bildoj determinis la revon de germanoj al Ĉinio, sed multaj el ili konas nenion pri la lando.

Ĉinio estas granda lando. Por fremdlandaj raportistoj la malfacilo kuŝas en la enhavoriĉo de ĝia vivo. Kia ajn raporto pri la lando ŝajnas pravigebla. Sed, ĉu oni kaptas la esencon? Oni facile juĝas aferon laŭ sia propra valorkoncepto. Sed tio justas al Ĉinio?

Novembre de 1987 invitite de la Guangdong-provinca Asocio por Amikeco kun Aliaj Landoj, mi unufoje venis al Kantono, Shenzhen (Ŝengen), Zhuhai (Ĝuhaj), Shantou, Foshan, kaj poste al Hainan-insulo, Shaoguan kaj Yingde. Ĉifoje mi venis al Hongkong. Mi aŭskultis klarigojn de la gastigantoj. Mi miris pri la multeco de konstruejoj en Guangdong kaj pensigis min pri ekonomiaj atingoj en la reformado. Kaj mi konsentis pri la propono de usonaj kunvojaĝantoj al ĉinaj amikoj: "Ne ripetu niajn mispaŝojn en via evoluo."

Ni germanoj spertis du mondmilitojn. Ni akcentas la signifon de paco por evoluo de lando. Kaj ĉiflanke ni kaj niaj gastigantoj atingis saman konkludon. Min tamen surprizis multaj filmoj pri milito en televido. Mi miris ankaŭ, ke Hainan-insulanoj tiom allogite rigardas sangajn lukt-filmojn.

Mi kaj klarvidaj ĉinaj oficistoj havas saman opinion pri mediprotektado kaj vidis, ke ĝi neniom malpli gravas ol produktado. Tamen, kiam antaŭ fumtubo ellasan-

Ĉinaj amikoj gratulas s-ron Thomas Mirke pro lia edziĝo en Pekino.



de THOMAS MIRKE

ta densan fumon en kampara briko-farejo mi demandis pri aparatoj por forigi polvon kaj malutilan gason, la administranto respondis: "Ni plilongigis la fumtubon antaŭ nelonge. Sufiĉas."

Mi kaj alilandaj kolegoj ankaŭ avertis pri la sekvo de la plano preni aŭton kiel ĉefan trafikilon en urbo. Eŭropanoj plej klare vidas la sekvon de grandnombraj aŭtoj: pli da tersurfaco asfaltita kaj cementita, vojstopo, manko de garaĝoj, neeltenebla bruoj kaj ole-odoro, velko de arboj, manĝaĵa veneniĝo, detruo de sano, infana astmo kaj pulm-kancero. Aŭtune de 1987 en la urbo Kantono oni vidis multajn vojstopojn: taksioj, ŝarĝaŭtoj kaj aŭtobusoj atendis en longaj vicoj. Kia aspekto estos, se enkalkuli privatajn personaŭtojn? Tiam ni sciis tre malmulte pri burokratismo, kiu tiom malfaciligis la urboplanadon. Ni ne konis la financon problemon de la lando. Ni ne sciis, kiel malfacile estas plurhore veturi aŭtobuse de tago al tago kaj eĉ en vintro bicikli dek kilometrojn al laboro. Hodiaŭ mi komprenas, kial miaj ĉinaj kolegoj prenas aŭton kiel rimedon solvi multajn problemojn.

Ni ankaŭ prezentis nian opinion pri la utiligo de nuklea tekniko. Kial, ni pensas, prudenta lando ankoraŭ uzas atomenergion post la akcidentoj de reaktoroj Harrisburg kaj Ĉernobil? Aliflanke, eĉ kritikistoj de la Federa Germanio rekonas, ke energifonta politiko de Ĉinio estas modelo. Estas nenio grava, ke unu-du nukleaj elektrejoj estas en tiom vastega lando, kompare kun Eŭropo, kie koncentriĝas nukleaj



La aŭtoro

Foto de QIN XUZH

elektrejoj. Ĉinio uzas multspeccajn energifontojn: akvan, karbon kaj sunan. Mi miris pri sunenergiaj kolektiloj sur tegmentoj en Beidaihe kaj Pekino.

Mi surpriziĝis ankaŭ pri aliaj aferoj: Zhuhai ŝajnas eŭropa urbo, dum aspektas tute alie la urbo Sanya sur Hainan-insulo. La urbo Shantou posedas modernajn fabrikojn, kiujn bone konas eŭropanoj, kaj sur Hainan-insulo forte odoras kaŭĉuka fabriko. Ĉio ĉi tio impresis min des pli profunde, kiam mi venis ree al Ĉinio en 1988 kaj laboris kiel fakulo en Pekino. Unuflanke, Ĉinio havas modernajn konstruaĵojn, kiel la hoteloj Lido kaj Shangri-la, aliflanke, ĝi alfrontas loĝejan problemon. Kvar fraŭloj kunloĝas en unu ĉambro. Ĉiu posedas nur unu valizon. Ĉu troveblas pli akra kontrasto ol tiu?

Hodiaŭ, kiam mi konas problemojn alfrontatajn de la giganta lando kaj ĝian multnombrian loĝantaron, mi sentas, ke miaj demandoj kaj vidpunktoj estas tre naivaj. Tiam mi ne bone konis la vivon de ordinaraj ĉinoj, kiun la ĉina aŭtoritato ŝajne ne volis konigi al alilandanoj.

Profunde impresis min, ke ĉinoj senplende venkas diversajn

malfacilojn en la ĉiutaga vivo. Mi admiris ilian aplombon antaŭ la afektantaj, maldiligentaj kaj senkapablaj ŝtatoficistoj kaj mallaboremaj, en angulo dormetantaj vendistoj, kiuj ne atentis klientojn. Mi apreas la homecon prezentitan per kelkaj vortoj. Mi ŝatas ankaŭ la obstinecon de la popolo, antaŭ kiu finfine malvenkos ĉiaj arogantaj oficistoj kaj gurditaj rutinoj. Tie la homaj sentoj ne fariĝis komercaĵoj sub merkata ekonomio.

Tamen restas nekompreneblaj por mi multaj aferoj en Ĉinio, ekzemple, tro komplikaj kaj pezaj procedoj. "Ni ĉinoj emas kompliki simplan aferon," diris al mi mia konato. Malgraŭ propagando de Karl Marks, la germana filozofio restas enigmo por multaj ĉinoj, samkiel la komplikaj procedoj de Ĉinio estas enigmo por mi. Kial oni ne povas libere eniri la Pekinan Mezgradan Popolan Juĝejon? Kial oni devas peti de la pordogardisto kupran identigilon, iri kelkajn paŝojn kaj doni ĝin al soldato, kaj poste la soldato siavice redonas ĝin al la gardisto? Kial la ĉinaj kolegoj, vizitonte alilandajn amikojn en la hotelo Amikeco, devas pleningi intervjuan formulon? Kial nepre necesas oficiala atestilo en traktado de ĉiu afero, eĉ privata



Kampanara korto

Foto de THOMAS MIRKE




Angulo de tradicia ĉina korto

Foto de THOMAS MIRKE

Strato de Pekino

Foto de THOMAS MIRKE



afero? Kial atestilo subskribita de aŭtoritato nepre devas esti prenita de la petanto, kaj ne sendita poŝte? Ja ĉiu scias, ke la sendado bezonas duontagon. Kial la respondoj al konsultantoj ne estas sufiĉe fidindaj?

Malgraŭ ĉio ĉi tio, miaj germanaj konatoj, kiuj restas en Ĉinio pli-malpli longe, ĉiuj amas Ĉinion, preferas resti tie pli longe, aŭ deziras denove veni al ĝi kiel vojaĝantoj, vojaĝgvidistoj, entreprenistoj, interpretistoj aŭ kiel reprezentantoj de industriaj rondoj. Sed nur malmultaj germanoj, kiuj restis en Ĉinio longtempe, povas diri, kial ili enamiĝis al tiu lando. Ĉiu, kiu konas ĝin kaj ĝiajn mankojn kaj fortajn punktojn, estas nerezistebla allogata de ĝia ĉarmo, la ĉarmo de la popolo.

Kvankam Ĉinio estas malfermita al la ekstera mondo de dek jaroj, tamen ĝiaj multaj aspektoj, neviditaj kaj nekonataj de eŭropanoj, atendas malkovron. Por koni Ĉinion oni devus investi pli ol sian vivdaŭron. ■

*\*La aŭtoro el la Federacia Respubliko de Germanio laboras en la redakcio de Beijing Rundschau, semajna revuo en la germana lingvo.*

### SUR DEZERTO

Pentraĵo de LIU DAWEI

La pentraĵo prezentas surdezertan vojaĝon de zang-nacianoj rajdantaj sur azeno kaj poefago. Zang-nacio estas unu el la nacimalplimultoj de Ĉinio. La nacianoj loĝas en Tibeto, Qinghai, Gansu, Sichuan kaj Yunnan. Ili ŝatas havi longajn harplektaĵojn, buntajn ornamaĵojn por longa robo laĉita ĉe la dekstra flanko. La viroj kunportas ponardon ĉe kokso. La nacio okupiĝas ĉefe pri paŝtado, ŝatas danci kaj kanti kaj kredas je lamaismo.



## ESP-NOVAĴOJ

● Laŭ invito de ĈEL, Ivica Sporjarec, reprezentanto de la Kroatia Esperanto-Ligo de Jugoslavio, kaj lia edzino Vanda Bralic vizitis Ĉinion de la 14-a de novembro ĝis la 3-a de decembro 1988. Ili vizitis Pekinon, Nankinon, Ŝanhajon kaj Hangzhou. La gastoj ankaŭ faris laborviziton al ĈEL, la redakcio de EPC, la Ĉina Esperanto-Eldonejo, Esp-Sekcio de Radio Pekino, Esp-Sekcio de la Internacia Librokomerca Kompanio de Ĉinio, havis kunsidon kun esperantistoj de la vizititaj lokoj aŭ faris al ili raporton.

● Laŭ invito de la Shenyang-a Esperanto-Asocio, s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, vizitis la urbon Shenyang kaj poste Harbin, Jiamusi kaj Pekinon de la 10-a ĝis la 20-a de oktobro 1988. La gasto kaj gastigantoj interkonsiligis pri okazigo de Esp-turismo, opini-interŝanĝa kunveno de esperantistoj k.a.

● La Xinjiang-a Filia Asocio de la Ĉina Medicina Esperanta Societo fondiĝis en la komenco de decembro 1988, Maimaiti Yiming, vicestro de la Higiena Buroo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono funkcias kiel ĝia vicprezidanto. Ĝi estas la unua provinca nivela medicina Esperanta asocio kaj eldonas sian organon "La

Xinjiang-a Medicina Esperanta Revuo".

● En la 23-a de novembro 1988 fondiĝis la "Amikoj de Esperanto en Changzhou" de Jiangsu-provinco. Vicurbestro Han Zhaochun kaj aliaj du respondeculoj funkcias kiel ĝiaj honoraj prezidantoj. Vicestro de la Propaganda Departemento de la Komitato de KPC de la urbo estas elektita kiel ĝia prezidanto kaj 20 entreprenoj fariĝis ĝiaj grupaj membroj. Tion raportis lokaj ĵurnaloj, radia stacio kaj televida stacio.

● La 9-a de oktobro 1988 estis la 19-a Monda Poŝta Tago. La Poŝta Administrejo de Jiangsu-provinco speciale emisiis belan memoran koverton por celebri la tagon. La memoraj koverto kaj poŝtstampo surportis vortojn en la han-a lingvo kaj Esperanto. Tio okazis unuafoje por provinca poŝta administrejo de Ĉinio. La projektinto de la memora koverto estas Bao Junhe kaj tiu de la poŝtstampilo estas Zhang Linrui.

● Esperanto-klubo "Kolombo de Paco" organizas internacian fotoekspozicion sub titolo "Esperanto, Paco, Planedo, Ni". La organiza komitato esperas ricevi kolorajn kaj nigrablankajn fotojn de la tuta mondo pri Esperanto-movado, pacbatalo, naturo, ekologio, politiko, kutimoj de popoloj, turismo. spor-

to, ripozo, humoro ktp. La ekspozicio okazos en kelkaj urboj de Sovetunio kaj poste en aliaj landoj de la mondo laŭ propono. Fotojn sendu al: Vasil Stanoviĉ, 293720 Dro-gobic, Lvov obl. Ukrainio, Pk 20, Sovetunio.

● "Katalogo de Hungarlandaj Esperantaj Poŝtmarkoj", kiu enhavas Esperantajn poŝtstampojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj filatelajn tutaĵojn aperintajn en Hungario de 1918 ĝis 1987, estas mendebla kontraŭ 6 int. resp. kup. inkluzive de sendkosto, ĉe Vilmos Radnai, H-2331 Dunaharaszti, pk. 86, Hungario.


● Fame konata esperantisto kaj entuziasma leganto de El Popola Ĉinio D-ro Petro VAN TERWISGA starigis monumenton de Esperanto sur la placo de la insulo Vlieland, Nederlando en julio de 1988. Multaj geesperantistoj el proksimaj kaj malproksimaj urboj partoprenis la inaŭguron.

● En decembro de 1988 s-ro Joachim Werdin komencis esplorvojaĝon tra kelkaj landoj de Azio. Tio estas signifplena paŝo en multjara plano pri agado cele al evoluigo de la Esperanto-movado en Azio. Li plenumis la taskojn por ke UEA havu konkretan materialon pri la reala esperantista agado en Azio, precipe tie kie la movado estas malforta.

Ivica Sporjarec kaj lia edzino en la redakcio de EPC



La memora koverto de la 19-a Monda Poŝta Tago emisiita de la Poŝta Administrejo de Jiangsu-provinco de Ĉinio





# Familia problemo de psikologia docento

(Novelo)



**D**E longe li havis intencon fondi psikologian konsultejon por helpi suferantojn de psikaj perturboj. Sed en kia maniero? Post longa konsiderado li decidis apliki manieron interparoli kun pacientoj en telefono, por familiarigi la konsultadon kaj rezultigi pli bonan efikon.

Li edziĝis antaŭ du jaroj sed ne patriĝis. Ĉar li ne volis, kaj la edzino obeis lin. Post la fondiĝo de la konsultejo, ĉiuvespere li okupiĝis pri telefonado aŭ verkado kaj malmulte interparolis kun la edzino. Foje ŝi iris al la edzo kaj zorgeme diris al li: "Jam malfrue, iru dormi." Sed li respondis sen kaplevo: "Vi dormu sola." Ŝi suspiris, sidiĝis sur rando de la lito kaj malgaje rigardis al lia dorso. "Li ŝanĝiĝis kaj ne ŝatas min plu." Tristo mordis ŝin. Por reveki la amoron de la edzo, ŝi multe cerbumis konsultante psikologiajn librojn de la edzo, sed la edzo tute neglektis ŝian penon, kaj tio tre ĉagrenis ŝin.

Iun posttagmezon sinjorino telefonis al li.

"...mi petas vian helpon... Mi estas tre afliktita, mi suferas de melankolio," en telefono sonis raŭketa voĉo.

"Ne ekscitiĝu, mi petas, parolu malrapide. Mi helpos vin laŭeble."

"Mi maltrankviliĝas pri la estonteco, la vivo farĝis malhela."

"Kiam aperis ĉe vi la sento?"

"Mi ne povas diri precize..." Post momento ŝi daŭrigis: "Lastatempe mia edzo estis tro okupata. Mi volas, ke li aŭskultu mian parolon kaj komprenu mian senton, sed li fariĝis apatia al mia ekzisto kaj ĉiam okupas sin per siaj aferoj..."

Li silentis ĝis li aŭdis ŝian plorĝemon. "Ho... estas tiel," li skuis la kapon kun komprena mieno.

"La vivo fariĝis pli kaj pli sengusta kaj min ĉirkaŭas nur enueco kaj soleco... Mi petas vin liberigi min el la turmentado."

"Jes...kaj...sed..." li balbutis.

"Helpu min," la pacientino ekploretis.

Li demandis malrapide: "Ĉu vi ne sugestas, ke pli kaj pli maloftiĝis la sentoreciproko inter vi kaj via edzo?"

"Jes."

"Do fremdiĝas la du koroj," li diris kvazaŭ al ŝi kaj ankaŭ al si mem. "Ĉu li ankoraŭ amas vin?" Lia voĉo senfortiĝis.

"Mi ne scias, eble jes, sed mi ne estas certa pri tio."

Li scias, ke ofte en tia problemo la seksa vivo ludas decidan rolon. "Ĉu decas iom paroli pri via privata vivo?" Li demandis kun atentemo.

Estis silento.

"Mi aludas..." Kiam li volis ekspliki sian demandon, la pacientino interrompis lin kaj diris senhezite: "Ĉu vi aludas tian aferon?"

Post momenta hezito li diris laŭeble aplombe: "Mi pensas, ke vi bone komprenas."

"Kiel mi esprimu? Li ne estas plu tenera al mi, se foje estas tia, li rigardas tion nur kiel devon." Ŝi denove ekploris.

Li dronis en meditado. Kiam reciproka altiro malaperos inter paro da geedzoj, seninteresa estos ilia kunvivado. Li ŝatas psikologie kaj fiziologie analizi la vivon de la pacientoj, kaj li ĉiam sukcesis konvinki ilin.

Sed hodiaŭ li ne povis regi sin. Li demandis ŝin nur pri familia akordeco, sanstato k.a., kaj ne povis trankviligi ŝin. Interparolante kun la pacientino, li mem dronis en senpacienco kaj maltrankvilo.

"Pardonon, ke mi ne povas tuj respondi al via konsulto. Ĉu decas peti vin al mia konsultejo ĉi-vespere, duonon post la sepa?" Li senprecedence konsentis akcepti pacienton en sia hejmo por pli detale esplori la problemon.

La edzino revenis laca. Enpaŝante ŝi estis mirigita, ke la tablo estas kovrita de abundo da pladoj. Ŝi diris nenion al la edzo pro la miro kaj nur rigardis al li.

"Bonan vesperon," li antaŭenpaŝis tenere salutante kaj prenis de sur ŝia ŝultro la mansakon.

Antaŭe ŝi devis iri en la kuirejon tuj post hejmenreveno, kaj nun la preta tablo konsternis ŝin kaj ŝi kunfrotadis la manojn.

Li ekrigardis al la laca mieno de la edzino, ridetis pardonpete kaj kisis la edzinon ekstreme tenere.

“Ne,” ŝi ruĝiĝis, “oni ridos.”

“Tion mi ne zorgas,” li eĉ levis la edzinon.

“Lasu, lasu,” la edzino pugnigis lin, sed tio pligajigis lin. Li metis la edzinon en sofon kaj samtempe sentis, ke falis la ŝtono sur la brusto.

Post vespermanĝo, anstataŭ sin okupi per legado, li sidigis en sofo kaj babilis kun la edzino.

Li kore dankis la pacientinon, ke ŝia konsulto lin atentigis pri la fremdiĝo inter li kaj la edzino. Li sentis honton, ke li, psikologo, tamen ne rimarkis la psikan ŝanĝigon de la edzino.

La edzino eniris kun telero da ĉerizoj kristale brilaj. Li etendis manon por preni, sed la edzino repuŝis lin, ĉarme ridetis, prenis unu ĉerizon kaj metis ĝin en lian buŝon.

“Ĉu dolĉa?” ŝi demandis klinante la kapon flanken, kiel knabineto.

“Ho, tre acida,” li grimacis enspirante.

“Ĉu?” ŝi miris kaj volis mem gustumi.

“Ne, tre dolĉa!” Li prenis la edzinon en sian sinon.

La nokta kurteno falis dum ilia tenera konversacio.

Jam estis duono post la sepa. Li stariĝis kaj ekrigardis tra la fenestro.

Estis la oka. Sed la pacientino ankoraŭ ne aperis.

“Kiel estas al vi?” zorgeme demandis la edzino.

“Nenio grava.”

Li alprenis ŝian manon kaj karesis ĝin.



“Ĉi-vespere mi akceptos pacientinon hejme. En telefonado mi sciis, ke ŝi troviĝas en malbona psika stato. Mi estas iom maltrankvila pri ŝi.”

Je ĉarma rideto ŝi retiris sian manon, stariĝis kaj klinigis super lin sidantan en sofo.

“Ŝi jam aliris.”

“Kio?” li mire levis la rigardon al la edzino.

“Ŝi jam akiris kontentigan respondon. Kredu, ŝi ne estas virino neprudenta. Virinoj devas fari ian sinoferon, sed la edzoj devas kompreni ilian sinoferon.”

Li honte klinis la kapon.

Ŝi malleviĝis kaj ameme karesis al li la densan hararon.

Esperantigis **WANG LIAO**

## ABONTARIFO DE EPĈ (ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj	Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00	Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480	Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Belgio	BEF	550	930	1300	Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00	Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00	Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00	Por aliaj landoj en Eŭropo:				
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00		GBP	8.00	13.60	19.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900		USD	10.00	17.00	24.00
Italio	ITL	18000	30600	43000	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
Japanio	JPY	3000	5400	7500		GBP	5.00	8.50	12.00
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500		USD	6.50	11.00	16.00

# Ci-istino Li Qingzhao

de MEI ZHI

**L**I Qingzhao (Li Ĉingĝaŭ) (1084-1155?) estis elstara ci-istino en la literatura historio de Ĉinio. Ŝi estis eminenta en poezio kaj prozo, precipe en verkado de ci-oj. Ŝi estis elstara reprezentanto de la pimpaskolaj ci-istoj. Ŝiaj sukcesoj superis tiujn de la antaŭaj kaj postaj ci-istoj de la sama skolo.

Sia vivo povis dividiĝi en du periodojn. En la antaŭa periodo ŝi vivis feliĉe. Ŝiaj gepatroj estis alte klerigitaj. Ŝi kaj ŝia edzo Zhao Mingcheng (Ĝaŭ Mingĉeng) sincere amis unu la alian. Ili kune kontrole komparis klasikajn librojn, verkis poemojn kaj ci-ojn, aprecis sigelilajn gravurojn, kaligrafiajn kaj pentraĵojn kaj kolektis multe da ili. En la posta periodo okazis granda ŝanĝo al ŝia vivo. Ŝia edzo mortis de malsano, kaj tuj poste la patrolando estis invadita de eksteraj malamikoj. La Suda Song-dinastio troviĝis en danĝero. Por eviti la militan haoson, Li Qingzhao vagis en suda Ĉinio kaj pasigis siajn lastajn jarojn en soleco kaj mizero. Ŝiaj malsamaj travivaĵoj faris ŝiajn verkojn diferencaj en enhavo.

Ŝiaj ci-oj faritaj en la antaŭa periodo plejparte impresas freŝe kaj gaje kaj sentigas junan vivecon. Ekz., ŝia ci-o "Laŭ la Melodio Rumengling" priskribas revenantan boaton, lotusflorojn, strandon kaj surprizitajn ardeojn. Ĝi estas plena de viveco kaj vigeleco. Ŝiaj nemalmultaj ci-oj pri naturaj pejzaĝoj estas klaraj kaj gajaj. Ili montras grandan admiron kaj varman amon al la belo entenata en la naturaj pejzaĝoj. Estas multe ŝatata ankaŭ ŝia alia ci-o:

*Lastnokte pezis pluvo, furiozis vento.  
Post sata dormo ne forpasis l' ebrisento.  
Demandis mi levanton de l' kurteno.  
Ŝi diris, ke senŝanĝa restas spektabilo\*.  
"Ĉu vi rigardis kun atento?  
Ja multa verdo, rara ruĝo en atendo..."*

Li Qingzhao vivis en epoko, en kiu la feŭda etiko katenis la virinojn. Sed ŝi kuraĝis rompi la katenon kaj modlis la figuron de junulino kun nobla idealo kaj kuraĝa strebo. En "Laŭ la Melodio Dianjiangchun" ŝi skribis:

*Post la ludad' trapeza,  
stariĝas ŝi tro laca eĉ por milda mankareso.*

*Kristalas roso sur florŝosoj.  
De ŝvito malsekiĝis ŝia vest' malpeza.*

*Subite viron ŝi ekvidas,  
en ŝtrumpoj ŝi honteme forrapidis —  
l' orpingl' el haroj glitas.  
Ĉe l' pordo ŝi kapturton faras,  
sed tamen verdan prunon ŝi ekflaras.*

La versoj prezentas la figuron de naiva kaj malkaŝema knabino. Ŝia alia ci-o "Laŭ la Melodio Yujia'ao" montras ŝiajn altan aspiron kaj sopiron al libero kaj bela idealo. Ŝiaj ci-oj pri amo estis pli varmaj kaj kuraĝaj. En "Laŭ la Melodio Yijianmei" legiĝas jenaj versoj:

*Disfalas floroj, kuras akvo mem — natura iro.  
Ja samas niaj amsopiroj,*



*duloke tristas gekaruloj.  
Ne eblas por mi el la ĉagrenseno min-elŝiro:  
La brovojn ĝi forlasis,  
la koron jam enpaŝis.*

La versoj estas emociaj kaj sentimentalaj. Ŝia “Laŭ la Melodio Zuihuayin” estas eminenta verko kun kreivo. Laŭdire, ŝi skribis ĝin al sia edzo Zhao Mingcheng. Leginte ĝin, Zhao sin fermis en ĉambbron por tri tagoj kaj verkis multajn ci-ojn por respondi al ŝi. Zhao miksis siajn verkojn kun tiu de la edzino kaj prezentis ilin al amiko por peti lian opinion. La amiko diris al li, ke nur tri versoj estas la plej bonaj. Tiuj tri versoj ja estis verkitaj de Li Qingzhao:

*Ĉu la animo en trankvilo?  
La vento okcidenta levas pordkurtenon,  
mi en sveltec’ superas krizantemon!*

En la versoj ŝi prezentis longtempan sopiron per homa marasmigo. Tio estis tre lerta komparo.

Plejparto de la verkoj de Li Qingzhao en la posta periodo prezentis ŝian malfeliĉon kaj ankaŭ ŝian ĉagrenon pro la kadukiĝo de la patrolando. En sia longtempa vagado ŝi skribis:

*Kie estas mia hejma lando?  
Mi forgesas ĝin nur en ebrio.*

El “Laŭ la Melodio Pusaman”  
*Forflugis jen sovaĝanseroj,  
malfacile skribeblas la zorgoj.*  
El “Laŭ la Melodio Niannujiao”

Per sia sopiro al la hejmloko ŝi esprimis ankaŭ la komunan senton de rifuĝintoj, kiuj devis disigi disde siaj familianoj. Ŝia “Laŭ la Melodio Yongyuyue” implicite montras ŝian malkontenton kaj zorgon al la aktuala vivo. En “Laŭ la Melodio Shengshengman” ŝi uzis sinsekve sep duojn da samaj ideografiaj por esprimi sian solecon kaj ĉagrenon.

Li Qingzhao postlasis ne tre multajn verkojn, kiuj tamen klare montras ŝian mirindan talenton. Ŝi opiniis, ke ci-oj estas apartaj poeziaĵoj postulantaj ritmon kaj guston, sed ili ne povas havi vastajn temojn kiel poemoj. Tio limigis la enhavon de ŝiaj verkoj, tamen ebligis al ŝiaj verkoj atingi pli grandajn sukcesojn. La lingvo en ŝiaj ci-oj estas klara, senafekta, flua kaj riĉa je bela ritmo. Ŝi estis lerta en verkado de liriko. Ŝiaj ci-oj en la posta periodo estis liberlasaj, brilis en la Norda kaj Suda Song-dinastioj kaj multe influis la postajn ci-istojn. ■

*\*Spektabilo estas ĉina arbo kun folioj elipsaj,  
floroj blankaj aŭ rozkoloraj kaj fruktoj dolĉaj kaj  
iom acidaj.*

## ELEKTITAJ VERKOJ DE LI QINGZHAO

### Laŭ la melodio Yujia’ao

*Matenaj ondoj kaj nebul’ tuŝigas kun ĉielo,  
balancas sin la palaj steloj, dancas mil mil veloj.  
En song’ animo mia venas kvazaŭ al di-ejo,  
kaj tie aŭdas, ke li ame  
demandas, kiu loko estas mia ĉelo.*

*Respondo mia: Vojo longa, sed nun jam vespero.  
Mi kvankam verkis frapajn versojn, vanas mia kreo.  
Jen blovas forta vent’ rapida je natudek mil lioj.  
La vent’ ne ĉesu,  
sed pelu mian boateton al Monttri’ de Feoj<sup>1</sup>.*

### Laŭ la melodio Rumengling

*Vesperon-ĉe Xiting mi ofte rememoras:  
Post peza ebriiĝo revenvojon ne rekonas.*





*Enboatig' malfruas post la sata ĝuo,  
kaj mi mistrafas lokon, kie lotusplantoj floras.  
Eliru haste, remu haste...  
De l' strando, ho, ardeoj surprizite soras.*

## Laŭ la melodio Zuihuayin

*Senfine longas la nubozaj tagoj en nebulo,  
senfine fumigas la incens' en or-best-urno.  
Denove la Duoble-naŭa Festo<sup>2</sup>.  
Noktmeze, en moskitvual' el tulo,  
la jada kapkusen' en fridtemperaturo.*

*Vespere drinkis mi ĉe l' plektbarilo,  
en la manik' aromas florospiro.  
Ĉu la animo en trankvilo?  
La vento okcidenta levas pordkurtenon,  
mi en sveltec' superas krizantemon!*

## Laŭ la melodio Yuanwangsun

*Alblovas vento kaj ondadas la senlima lago.*

*En tardaŭtuna tago,  
jam raras ruĝkoloro.  
Spirante intimecon l' akvo, monto en pejzaĝo  
neesprimeble plaĉas al la homa koro.*

*Maturas lotussemoj, kadukiĝas la folioj.  
La roslavitaj akvaj herboj verdas kun glimbrilo.  
Ardeoj dormas sur sablej', la kapon ne returnas,  
verŝajne ĉagrenitaj pro l' tro frua mia hejmeniro.*

## Laŭ la melodio Shengshengman

*Mi strebe serĉas, sondas, spuras:  
malvarmo morna monopole nuras.  
Funebra sento frida simple senmezuras.  
Se l' varma temp' subite spertas frostostarton,  
plej malfacilas flegi l' farton.  
Ĉagrenas ar' sovaĝansera<sup>3</sup>  
per sia flugo la pretera--  
konata en la pasinteco kaj nun reapera.*

*Amase kuŝas krizantemaj floroj sur la tero;  
velkintas jam la belo,  
nun kiu degnas zorgi pri l' mizero?  
Mi solas ĉe l' fenestra kadro,  
kvazaŭ dum tragedio en teatro!  
Platan' susuras pro la pluvfadenoj;  
senĉese ĝis vespero  
gutadas la pluveroj.  
Ja tiu tristopleno  
ne esprimeblas per la sola vort' "ĉagreno"!*

## Laŭ la melodio Wulingchun

*Post vent' la floroj jam pereis, tero bonodoras.  
Malfrue. Kombi l' harojn mi langvoras.  
L' objektoj restas, sed ne l' homo, ĉio vanta nomo.  
Ekfluas larmoj antaŭ ol mi ekparolas.*

*Printemp' plu belas, onidire, ĉe Shuangxi-rivero.  
Mi volus ĝui ĝin en bark' sen ĝeno,  
sed timas, ke la barko akridforma de la loko  
ne povas porti tiom pezan ŝarĝon de ĉagreno.*

Elĉinigi **LAŬLUM**

1. T.e. la tri feaj montoj Penglai, Yingzhou kaj Fangzhang (elp. Penglaj, Jingĝoŭ kaj Fangĝang) en Bohai-marĝo. Laŭ ĉina mito ili estas neatingeblaj por la homoj.

2. T.e. la Naŭa de la Naŭa Monato, festo en kiu kuniĝas la familianoj.

3. Sovagansero estas birdo, kiu povas transporti leterojn por karuloj, laŭ ĉina literaturo.

VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (27)

# Vido de la urboj Wuhu kaj Maanshan

**F**LUSO de Yangzi-rivero kutime okazas en julio kaj aŭgusto, sed en la mezo de septembro de 1988, kiam mi venis al la urbo

Wuhu de Anhui-provinco, la multe malfruiĝinta kulmina fluso de Yangzi apenaŭ venis de Wuhan al Wuhu, kaj la akvonivelo je unu

metro superis la alarman skalon sur la mezurstango. Pro tio loĝantoj ambaŭborde streĉe preparis sin kontraŭ la eventuala superbordiĝo,

La kunfluejo de Yangzi kaj Qingyi



Teksto de DA WEI  
Fotoj de LI CHUNGENG


kaj la baraĵoj estis daŭre altigitaj.  
Parto de la atendhaloj kaj albordi-  
gaj pontoj estis inunditaj. Sed en la  
urbo regis bona ordo, kaj la urba-




En Rada kaj Radinga Fabriko sub la Ŝtala Kompanio de Maanshan

Foto de DA WEI

En Wuhu





prosperigon kaj depresion. En la 70-aj jaroj de la 19-a jarcento Wuhu fariĝis aperta haveno kaj prosperis ĝia riza komerco, kaj la jara eksportita rizo atingis 600 milionojn da kg. En la tridekaj jaroj de la kuranta jarcento diversaj kialoj preskaŭ strangolis la rizan komercon.

En julio de 1984 rekomenciĝis la riza komerco kaj tiujare en Wuhu vendiĝis 50 milionoj da kg. da rizo.

Direktoro Hu diris al mi, ke la negocoj de la riza merkato povas ĝustatempe reguligi la specojn de grenoj de diversaj lokoj kaj stabiligi la grenan prezon. Sed en la lastaj 2 jaroj la riza merkato ne estis tiel vigla kiel antaŭe. Tion kaŭzis multaj kialoj: la rizaj negocoj de Wuhu stimulis disvolviĝon de diversaj entreprenoj uzantaj grenon kaj kuiroleon kaj granda kvanto da rizo estis foraĉetita survoje; natura katastrofo reduktis la produktokvanton de greno; la ekzistanta trafikpovo ne respondas al la bezono; multe ŝveligis la prezo de rizo... Sed malgraŭ tio, direktoro Hu montris sin optimisma por la estonteco. Li intencis pluaparte perfektigi la kontraktan respondecon interne de la entreprenoj kaj plifortigi kunagon kun diversaj lokoj.

noj vivis kiel kutime.

La urbo situas ĉe la kunfluejo de Yangzi kaj Qingyi, najbaras oriente al la urbo Maanshan kaj okcidente al Tongling. Sur ĝia areo de pli ol 4000 kvadrataj kilometroj vivas pli ol du milionoj da loĝantoj. La naturdotitaj kondiĉoj estas tre favoraj al ekonomia prospero.

## RIZA BAZARO

Wuhu estas lando riĉa je akvo-produktaĵoj kaj rizo. Tion rezultigis fekunda tero, modera klimato

kaj abunda pluvo. Krome, la facila trafikado sur la riveroj Yangzi, Qingyi kaj Zhanghe multe oportunistis la komercadon de rizo. Frue en la unuaj jaroj de la 19-a jarcento Wuhu jam fariĝis komerca centro de rizo de la ĉirkaŭaj regionoj. Tiam la urboj Wuhu, Changsha, Jiujiang (Ĝiŭĝjang) kaj Wuxi (Uŝji) estis honoritaj kiel "la kvar rizaj bazaroj de Ĉinio".

En sesetaĝa domo apud Yangzi mi renkontiĝis kun direktoro Hu de la riza bazaro. Li informis min, ke la riza merkato de Wuhu spertis

Fera pentraĵo "Pejzaĝo de Huangshan-monto"





## FERA PENTRAĴO

En Wuhu oni faras originalan metiartaĵon — pentraĵon el fera lameno. Oni diras, ke la feran pentraĵon kreis feraĵisto kaj pentristo antaŭ 300 jaroj.

Kun granda intereso kaj admiro mi vizitis la Farejon de Metiartaĵoj de Wuhu. Sekvante la fabrikestrojn Wang, mi venis en ĝian eksponejon. Mi estis ravita de la feraj pentraĵoj impresantaj kiel reĵeliefo. Tiuj pentraĵoj aŭ imponaj aŭ delikatgustaj ĉefe prezentas pinojn, bambuojn, florojn, herbojn, pejzaĝojn aŭ personojn.

En la laborejo mi vidis, ke metiistoj martelis lamenojn sur amboŝo, ĉizis kaj poste kunveldis ilin. Post nelonge aperis en iliaj manoj galopantaj ĉevaloj kaj pinaj branĉoj. S-ro Wang diris al mi, ke por fari feran pentraĵon oni devas plenumi la procedon de martelado, ĉizado, formogustigado, veldado, formopolurado, malhardo kaj lakado.

## MELONSEMOJ

Antaŭ kelkaj jaroj privata komercisto Nian Guangjiu (Njan Ĝuangĝiŭ) en Wuhu preparis malgrandan sed tre ŝatatan manĝaĵon — melonsemojn. Liaj varoj disvendigis en multaj lokoj tra la tuta lando, ĉu en butikoj, ĉu sur standoj. Li faris siatempe sensacion inter la kolegoj.

Sed nun Nian Guangjiu estas embarasita de la malbona administrado kaj dronigaj ŝuldoj. Malgraŭ tio, melonsemoj de Wuhu estas daŭre preferataj en la tuta lando. Pro tio multaj ŝtataj, kolektivaj kaj eĉ privataj entreprenoj sin ĵetis en akran konkurencon. La Ŝtata Kompanio de Melonsemoj de Wuhu estas gajninto en la konkurenco. Mi intervjuis direktoron Wang de la kompanio. Lia vizitkarto informis min pri lia alia ofico — ĉefdirektoro de la Melonsema Korporacio Yingchun de Ĉinio. Mi aŭdis, ke la unua melon-



En butiko de melonsemoj

sema kompanio de Ĉinio establita en 1985 antaŭe estis butiko de melonsemoj sub la urba frukta kompanio. Ĝi liberigis sin el la katenato atendi materialon en limigita kvanto kaj mem serĉis materialon fonton. Oni ŝanĝis la kondimentojn, multigis la specojn de produktaĵoj kaj ĉiamaniere klopodis por kontentigi la klientaron. En tiuj jaroj la kompanio prilaboris kaj vendis pli ol 12 mil tunojn da melonsemoj. Ĝiaj produktaĵoj estis eksportitaj al Usono, sudorientaziaj landoj, Hongkongo kaj Aomen. En septembro de 1987, la melonsema kompanio de Wuhu kaj frukta-melonsemaj entreprenoj de 12 provincoj kaj urboj grupigis en melonseman korporacion plej grandan en Ĉinio.

## ŜTALA URBO

Mi daŭrigis mian vojaĝon orienten por viziti Maanshan, la plej orienta urbo en la provinco. Tiu juna, ĉarma kaj pura urbo kovras areon de 1684 kvadrataj kilometroj kaj havas 970 mil loĝantoj. La urbokonstruado disvolviĝis kun arta lago kiel la centro. La lagon ĉirkaŭas 9 montoj Cuiluo, Jiuhua (Ĝiŭhŭa), Maan k.a. Ĉe la piedo de Cuiluo ŝtonego sin etendas en Yangzi-riveron. Ĝi estas la fama

vidindaĵo Caishiji. Atinginte la lokon, Yangzi devigite ŝanĝis sian direkton.

Caishiji (Cajŝigji) estis frekventata de la fama poeto Li Bai (701-762). Ĝuante tie la pejzaĝon, li verkis multajn poemojn. En la urbo estas lia tombo. Por memori la majstron, posteuloj konstruis memorturon kun lia nomo, skulptis por li statuon kaj faris tombon speciale por liaj vestoj. Tiuj lokoj estas tre ŝatataj de turistoj.

Maanshan estas urbo kun metalurgio kiel sia ĉefa industrio. Antaŭ 30 jaroj la loko estis vilaĝo kun dekoj da familioj. Ĝian grandigon akcelis la disvolviĝo de ŝtala industrio. Kiel unu el la 10 ŝtalaj bazoj de Ĉinio, la Ŝtala Kompanio de Maanshan fariĝis grandtipa uzino kun minekspluatado, ercoelektado, aglomerado, fandado, laminatado k.a. La kompanio produktas ĉiujare 2 milionojn da tunoj da ŝtalo.

La Unua Laminejo sub la ŝtala kompanio fondita en la 60-aj jaroj estas ĉina unika produktanto de trajnaj radoj kaj radringoj. En la varmega laborejo mi vidis, ke mekanika brako senĉese elprenas ardajn prilaboraĵojn el tri grandaj ringformaj fornoj kaj metas ilin sur la laminatan rultapiŝon. Post




La parko Jinghu en Wuhu

unuminuta kruda kaj fajna laminatado rado estis pretigita. Mi estis informita, ke en la pasintaj pli ol 20 jaroj la fabriko produktis 2 milionojn da tunoj da radoj, radringoj kaj diversaj ringaĵoj. Kelkaj specoj de la produktaĵoj estas akceptitaj de la internacia merkato.

En 1987, la kompanio konstruis novan laminatojn kun jara produktokvanto de 400 mil tunoj da altkvalitaj dratoj. La laminatoj estas moderne ekipita. La longa laborlinio kaj diversaj maŝinoj senĉese ŝanĝas ardajn ŝtalojn en dratojn de diversaj normoj. La ŝtala industrio de Maanshan komencis sian novan stadion de prosperiĝo. ■

En dratlaminatoj de la Ŝtala Kompanio de Maanshan  
Foto de DA WEI



Bazaro



ĈINAJ ARTOJ

# LA PEJZAĜA PIKTURO DE ĈINIO (II)

de XI JIANG

**E**N Yuan-dinastio (1206-1368) la ĉina pejzaĝa pikturo rimarkinde progresis. Famaj pentristoj en tiu periodo estis Huang Gongwang, Wang Meng, Ni Zan, Wu Zhen kaj aliaj. Pro la nacia subpremado

Aŭtuna Vespero (Ming-dinastio)

de **WEN ZHENGMING** (1470-1559)

Monta Loĝejo ĉe Fuchun-rivero (Yuan-dinastio)

de **HUANG GONGWANG** (1269-1354)





Mirinda Nubomaro ĉe Huangshan-monto

de LIU HAIJU (1896- )

kaj pesimismo de pentristoj, iliaj pentraĵoj, ekz. “Fea Loĝejo ĉe la Pluva Roko” de Huang Gongwang kaj “Ermita Loĝejo” de Wang Meng, temas ĉefe pri ermita vivo. Sed la verkoj de la supre menciitaj famaj pentristoj pli emfazas priskribadon de subjektiva sento. Ili kreis novan kriterion de ideo-esprima tuĉado de simplaj kaj graciaj figuroj. Ili aplikis kaligrafian teknikon de ĉinaj ideografiaĵoj en sia pentrado kaj enverŝis sian aspiron por esprimi sian senton kaj laŭeble doni poeziecon al siaj verkoj. Tio perfektigis la originalan estetikan sistemon de la ĉina pejzaĝa pikturo, kreis novan stilon por postaj pentristoj kaj formis alian kulminon de la ĉina pejzaĝa pikturo en ĝia disvolviĝo.

En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) iom post iom kadukiĝis la ĉina pejzaĝa pikturo. Kvankam en tiu periodo aperis multaj pentristoj kaj pentraĵoj, tamen la aŭtoroj tro imitis antikvajn pentristojn, malofte kreis novon kaj donis malmulte da viveco al siaj verkoj. La pejzaĝa pikturo de Ming-dinastio (1368-1644) inklinitis al imitado de antikvaj pentraĵoj kaj sin bazis sur la tradicio. La fama pentristo Dai Jin (Daj Ĝin) estis forte influita de la pentra stilo de la Suda Song-dinastio. Pentristoj Shen Zhou (Ŝen Ĝou), Wen Zhengming (Ŭen Ĝengming), Tang Yin kaj Qiu Ying (Ĉiu Ĵing) alte taksis la pejzaĝajn pentraĵojn de la Norda Song-dinastio kaj samtempe ellernis bonan teknikon de famaj pentristoj de Yuan-dinastio. En la malfrua periodo de Ming-dinastio disvolviĝis la literaturista

pejzaĝa pikturo. La literaturistoj-pentristoj kun Dong Qichang (Dong Ĉiĉang) kiel sia reprezentanto emfazis guston de tuĉado kaj formojn. Tio perdis vivecon al la ĉina pejzaĝa pikturo.


En Qing-dinastio (1644-1911) pli prosperis la literaturista pikturo. La kvar Wang-oj en la komenca periodo de Qing-dinastio, nome Wang Shimin, Wang Jian (Ŭang Ĝjan), Wang Hui kaj Wang Yuanqi (Ŭang Ĵuanĉi), nur imitis antikvajn pentristojn. Kvankam ili rafinis sian tuĉan teknikon, tamen al iliaj verkoj mankis vivetoso. Tiel stagnis la ĉina pejzaĝa pikturo. Malgraŭ tio, aliaj pentristoj ŝatis skizon, kaj iliaj verkoj havis sian originalecon. Ankoraŭ aliaj pentristoj, kia Shi Tao, elstara pentristo de Qing-

dinastio, persistis en realisma farado de pejzaĝaj pentraĵoj. Liaj verkoj estis libere tuĉitaj. Ĉu grandaj ĉu malgrandaj, ili havis originalajn dispoziciojn kaj tuĉ-manieron. Kaj la poemetoj sur liaj pentraĵoj estis tre humuraj.

En la moderna epoko aperis pejzaĝaj pentristoj kun certaj atingoj, kia Huang Binhong. Huang pledis por “lerni de antikvaj pentristoj kaj des pli lerni de la naturo”. Liaj verkoj estis modestaj kaj belaj kaj havis klaran originalan stilon.

La nuntempaj ĉinaj pejzaĝaj pentristoj aŭ bildigas la naturon per densa tuĉado kaj kun larĝa brusto aŭ esprimas sian fervoron por la vivo per malmulta tuĉado kaj kun implicita sento. La pentristoj respektas la tradicion, sed ne sekvas la antikvan arton. Ili atentigas krei novon, sed ne tro. Ekz., “Emei-monto en Aŭtuno”, “Sunsubiro ĉe Ronghu-lago” kaj aliaj pentraĵoj faritaj de la fama pentristo Li Keran (Li Keĵan) prezentas la belon de la naturo, sed ne naturalisme. Liaj verkoj estas dense tuĉitaj. En plena spaco troviĝas ankaŭ vaka loko, en originaleco ankaŭ tradicio. Liaj pentraĵoj, plenaj de dialektikaj kaj estetikaj pensoj, havas grandan influon sur la nuntempajn ĉinajn pentristojn.

La ĉina pejzaĝa pikturo kun originala arta stilo kaj bona tradicio montras trajton de la orienta arto kaj ankaŭ tiun de Ĉinio. Ĝi estas memstara arto, malsama ol la alilandaj artoj. ■



Jingang-monto

de **LU YANSHAO** (1909- )

Huayang-monto

de **SHI TAO** (1642- c. 1718)


Paštado sur Tianshan-monto

de **GUAN SHANYUE** (1912- )






Zhixing-monto de **HUANG BINHONG** (1865-1955)



Suda Ćinio en Printempa Pluveto de **LI KERAN** (1907- )

Granda Akvofalo de Alta Monto de **QIAN SONGYAN** (1899-1985)





Monto ĉe Tagiĝo de LIANG LANBO (1945- )



Monto kaj Akvo de HE HAIXIA (1908- )



Altebenaĵo en Aŭtuno de SHI LU (1919-1982)

# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Primitivaj arbaroj de Sovetunio en aŭtuno kaj vintro

de ALEKSANDR KOVALJOV (Sovetunio)

